



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista  
 Unu numero : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 25 FF  
 Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :  
 Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut  
 \*\*\*\*\*

## NI ĈIUJ EL(L)ITIGU !

*Jam de longe plagas ĝenerala emo (ankaŭ ĉe esperantistoj) elekti guroojn, savantojn, majstrojn, blinde fidi ilin kaj...konfidi al ili la plej delikatajn taskojn. Ĉe esperantistoj la kulto al Zamenhof, Hodler, Lanti, Lapenna...(ne tro grumblu tiuj, kiujn mi forgesas, eble baldaŭ venos ilia vico!) estas danĝera spuro el elitisma tendenco, kiun oni povas trovi en la mondo politika sub la nomo "reprezenta demokratio", sed ankaŭ en E-asocioj kun la kredo, ke la estraroj aŭ plenumkomitatoj havas la mision kaj la kapablon ĉion decidi, ĉion iniciati.*

*Sur la politika tereno, tiu emo konkretiĝis dum jardekoj per la "elekto" de deputitoj, de sindikatestroj, neniel kontroleblaj, kiuj, infektite kaj koruptite de la povo, kiun donis al ili la sistemo de reprezenta demokratio, nepre kaj neeviteble uzas tiun povon por mem profiti kaj faras el politiko sian metion por plu profiti kaj profitigi siajn amikojn kaj parencojn.*

*Mi ne kredas, ke la natura (?) filantropiemo de la homo povas venki la logkapablon de mono aŭ prestiĝo.*

*Se politiko povas havigi al siaj profesiuloj kaj monon kaj prestiĝon, la E-movado - feliĉe aŭ bedaŭrinde? - povas havigi nur prestiĝon kaj certe tre relativan, ĉar la E-mondo*

estas tiel eta, ke la prestiĝo de sekretario de loka E-grupo aŭ de redakt"oro" de E-gazeto kelkcentekzemplera estas tiel ridinda, ke oni ne povas bridigi intensan bezonon ridi, kiam oni malvarme konsideras ies papavan pretendemon en la E-movado! Kontraŭ tiu emo jam de longe daŭras la batalo kaj "Laŭte!" povas aspekti relative sukcesa ekzemplo pri bulteno "memmastrumata" per ne tro malrekta demokrateco.

Tamen, en la E-movado, kie estas tiom da gebonvoluloj, troviĝas ankoraŭ pli bonvolaj homoj, kiuj pretas transdoni al laŭdire pli kompetentaj, kleraj, lertaj... homoj sian laborparton. Ili estas tiel modestaj - aŭ tiel pigraj -, ke ili preferas, ke aliaj sekretarioj, komitatanoj, akademianoj, ktp, surprenu ĉiujn taskojn, por ke ili mem povu ĝui trankvile kaj pasive la feliĉon esti esperantistoj en tiel frateca etoso, ktp, ktp... En tiu "frateca etoso" odoras ŝvite nur kelkaj elektitoj!

Tiun naturan emon homan al facileco ni ĉiuj ekkonsciuj, ĉar ĝi troviĝas en ni ĉiuj. Ni ĉiuj strebu fariĝi "elitanoj", ĉar ĉiu unuope kapablas multon fari, se ekzistas taŭgaj strukturoj, taŭga etoso. Ekzemple, ni ne lasu al kelkdekoj da "verkistoj" la monopolon de E-gazetoj, kies publikigadon ebligas ja centoj aŭ miloj da kotizoj. Ĉiu havas ion por diri. Ĉiu sin esprimu libere. Ĉiu ja profitu de la rajto, kiun ŝi/li akiras per sia kotizo aŭ abono. Kaj la lertuloj ne havu pli gravan rajton.

Esperanto estu ilo por rekta demokratio, por sin-esprimado de ĉiuj individuoj, do ankaŭ de la plej modestaj. La kulto al E-idoloj estas pli steriliga ol instiga por multaj ordinaruloj. For la idolojn! Nek Zamenhof, nek Lanti, nek Hodler, nek Kajtiel-plu estis majstroj. La idoloj mem donis al ili tiun stultigan nomon. Jes ja, de tempo al tempo elstaras iuj samideanoj, kiuj aparte bone elturniĝis/as en iu fako. Tio komence estas tre utila por progresigi la movadon. Sed se tiuj elstaruloj tro longe okupus sian postenon, ili fine malebligas al aliaj "elstari".

Ho vi, "ordinaruloj", konservu vian modestecon, sed ĉi tiu ne estu bremsilo aŭ kamufliilo por vi. Ankaŭ vi iel kompetentus, se vi havus la eblecon dediĉi tempon al la de vi ŝatata(j) fako(j).

Ho vi, elituloj, lasu lokon al ĉiuj! Lasu al ĉiu la eblecon ellitiĝi kaj ... elitiĝi !

Kribo.

La venonta n-ro aperos meze de januaro. Ĝi estos almenaŭ 56-paĝa kun nova debato "Homoj kaj aŭtoj", la kutimaj rubrikoj, la lasta parto el "Alvokoj al la homa konscienco" kaj ĉio, kion la legantaro bonvolos surpaperigi. Se vi deziras plu ricevi L!, bonvolu akurate reaboni, dankon !

Lina Gabrielli :

## Kion signifas

### ne posedi komunan lingvon por interparoli

La vojaĝo de mia urbo al Varsovio fariĝis pli longa, ĉar mi eraris en la horaro de la trajnoj. Dušana Bartaggia gastigis min en Mestre dum unu tago kaj unu nokto; kaj pri mia malfruiĝo al "OPERA 81" mi avertis Andreon kaj Rikardon Grzębowski per telegramo.

Mi atingis la Varsovian stacidomon sabaton, la 24-an de Oktobro 1981, je la 15,15 horo. Kie la vagonaro perdis tri horojn mi ne scias. Sed Rikardo pacience atendis min tiom longe. Sendis lin Andreo, la invitinto al "OPERA 81", en kies kadro okazos prezento de poemoj de Walraamoen kaj de mi.

Rikardo tuj prezentiĝis al mi kaj per manoj gigantaj li prenis miajn tri pezajn pakaĵojn same kiel li prenis tri plumetojn. Mi miris pri lia granda forto kaj mi sekvis lin ĝis hotelo "Nova Prago", kie kolektiĝis la rondo de "Tutmonda Esperanto-Turismo". Mi promesis al Rikardo rapide refreŝiĝi, dum li atendos min en la manĝo-ĉambro kun sia fianĉino.

- Kion ni faru ? - ili diris. Ĉu ni iru al la kinejo ?

- Kio estos tie ?

- Mi ne scias, - respondis Rikardo.

Por ne resti sola, malgraŭ mia laceco mi kuniris pensante eniri filmejon. Mi ankoraŭ ne sciis, ke la kinejo estas la sidloko de "OPERA 81" kaj ke tie okazos la Esperanto-manifestacioj.

Mi tuj ekvidis en la unua vico aron da geamikoj kaj gekonatoj, inter kiuj Zofia kaj Jurek Fornalowie. Mi sidis apud ili dum sur la scenejo rolis du ĉarmaj kantistinoj. Poste, kiam sinjoro ceremonie vestita legis la programon por la vespero, Zofia informis min, ke la prezento de la poemoj jam okazis en la mateno. Knabino gajnis la duan premion pro la bona deklamo.

- Kaj kiu la unuan ?

- Ĝi ne estis aljuĝita.

- Kial Andreo Grzębowski ne atendis min, malgraŭ ke mi telegrafis al li, kaj li sendis Rikardon ?... Cetere, en la programo, mi legis, ke la prezento okazos morgaŭ...

- Morgaŭ "OPERA 81" fermiĝos.

Mankis tempo por konsterniĝo, ĉar la alproksimiĝanta Andreo susuris al mia orelo :

-Jen la prezento de viaj poemoj...

Subite la scenejo malfermiĝis kaj ĉaro da gejunuloj en ĉarmaj festaj kostumoj ekdancis, kvazaŭ papilioj, ĉu individue, ĉu grupe, kaj deklamis kaj kantis fabele.

Pro la surprizo, mi preskaŭ ne kredis al miaj okuloj kaj al miaj oreloj. Tamen en mia ĝojo mi ne povis ne pensi, ke se mi estus restinta en la hotelo por ripozi, nenio okazus malgraŭ la longa vojaĝo... Andreo atendis min ĝuste por tio.

Por la dramo pri Sankta Johana d'Arko ni sidis sur benkoj vicigitaj ĉe muro de la halo. Je la lumo de kandeloj la spektaklo estis vere sugesta.

Al la hotelo "Nova Prago" ni reiris per la aŭtobuso de la organizantoj. Tie ni vespermanĝis kaj retiriĝis en niaj ĉambroj. La fratoj Grzębowski venis al mi kaj la fortika Rikardo havis sur la brako la instruistino de la gejunuloj, kiu ne kuraĝis sin prezenti al mi.

Estis jam noktomezo, kiam mi povis dormi.

\*

Dimanĉon matene, ni ĉiuj revojaĝis aŭtobuse al la Kinejo por ĉeesti aliajn programojn kaj - laŭ la rekomendoj de Andreo - je la 12,30 ni reiris al la hotelo por la tagmanĝo. Mi supozis, ke tuj post la akompano de la jugoslavaj samideanoj al la aviadilejo, Andreo kondukos min al la Kinejo. Pro tio mi estis dirinta al geamikoj Fornalowie, ke ili nepre atendu min tie, post la 15-a horo.

Sed Rikardo informis min, ke al Kinejo ni ne reiros. Post la reveno de la aŭtobuso, la organizantoj reveturos al Bydgoszcz. Do, mi mendu taksion! Rikardo metis miajn paketojn en la halon de la hotelo kaj mi mendis la taksion pere de la hotel-deĵorantino. Post momento ŝi montris al mi papecon kun numero dudek. Mi komprenis, ke la taksio alvenos je la 20-a horo, ne post dudek minutoj; kaj por ne atendi tiom multe, mi iris antaŭ la hotelon kun espero esti pli bonŝanca. Tuj-tuj alvenis barbul-ŝoforo, kiu je la elirigo de la aliaj pasaĝeroj konsentis akompani min. Do, mi iris preni miajn valizojn kaj denove mi salutis Rikardon. Al la barbulo mi diris :

- Ni iru al la Operejo!

Kaj jen, li kondukis min al grandega placo antaŭ kiu troviĝas la fama teatro.

- Ho, tie ne! - mi diris per gestoj. Kaj per gestoj li respondis : - Tie estas la operejo !

Ni ne sukcesis kompreni unu la alian. Sciante, ke ankoraŭ la esperantistoj estas en hotelo "Nova Prago", atendantaj la aŭtobuson por reiri al Bydgoszcz, mi petegis la taksiiston, ke li rekonduku min tien. Sed li ne volis. Male, li petis pliajn klarigojn pri la loko, kien mi intencas iri. Mi ne havis la adreson kaj mi tute ne sciis, ke la vorto "OPERA" estas kombinaĵo de ses vortoj. La taksiisto scipovis paroli ankaŭ germane; mi iom france kaj angle, bone itale kaj esperante. Tamen ni ne sukcesis kompreni unu la alian. Tiam la taksiisto komencis demandi al la preterpasantoj. Neniu sciis respondi. Kaj li, ne volante rekonduki min al la hotelo "Nova Prago", longe kaj sensukcese rondiris tra la urbo. Cetere, mi eĉ forgesis la vorton "Kinejo". Sed ĉu li komprenus tiun Esperanto-vorton ?

Fine, kiam estis tro malfrue, li konsentis rekonduki min al la hotelo. Kaj nun neniu esperantisto estis tie, malgraŭ ke multaj homoj plenigis la halon. De tempo al tempo ŝajnis al mi rekoni iun... mi alkuris vane, ĉar temis pri miraĝo. Kaj ne nur la taksiisto ne komprenis min. Neniu alia. Ho, mi sentis min perdita!

La du deĵorantinoj provis telefoni al diversaj lokoj por scii kie troviĝas la sidejo de la Kulturaj Esperanto-aranĝoj, eĉ al la Itala Ambassadejo :

- Pardonu al mi! Estas la personaro de la hotelo, kiu faris vian numeron. Mi ja scias, ke vi ne povas helpi, - mi respondis al la kolerigita sinjoro de la ambassadejo, kiu respondis al mi.

Nun certe gesinjoroj Fornalowie ne plu atendas. Sed ne vidante min malgraŭ mia solena promeso, kial ili ne venis al la hotelo ? Bedaŭrinde, mia kajero kun ĉiuj adresoj de miaj polaj geamikoj restis en Italio. Mi havis nur la numeron de Irena Szanzer. Sed ŝi ne estis hejme. En la karuselo de miaj pensoj aperis la ideo iri al Radzym, ĉe miaj Fornalowie. Kial ne ? La taksiisto rigardis sur la mapo... Radzym troviĝas 25 kilometrojn for de Varsovio.

- Ne! Mi jam iris al Radzym dum la pasinta jaro kaj mi scias, ke ĝi ne estas tiom malproksima.

La barbulo koleriĝis :

- Nenion mi povas trovi sen adreso.

- Jes! Sed kial vi ne tuj rekondukis min al la hotelo, kiam mi petegis tion ?

Miajn vortojn li ne komprenis. Eĉ pli kolera, li prenis la monon kaj rapidis foriri.

Estis jam mallumo. Mi enprofundiĝis en miaj meditoj kun angoro.

Fine okazis miraklo.

Unu el la hotel-deĵorantinoj ĉe la akceptejo subite demandis al mi :

- Ĉu ne temas pri Raszym?

- Ho, jes, Raszym!

Volante agi kiel eble plej rapide, ŝi sendis hotel-helpanton surstraten por trovi la taksion, dum mi sidis sur fotelo de la halo kun reakirita trankvilo.

En la mallumo mi atingis la dometon de miaj Fornalowie. Ili troviĝis ĉe la kradaĵo de la ĝardeno, ĉar ili sciis pri mia baldaŭa alveno. Fakte, dum mia vagado kun la barbulo, ili estis en la hotelo "Nova Prago" por trovi min. Plurajn fojojn ili telefonis. Fine la deĵorantino diris, ke mi estas survoje al Raszym. Kia raviga sento, kiam mi denove povis paroli kaj rakonti! Gasto estis ankaŭ Kris Long, sed Kris ankoraŭ ne revenis, kvankam mi pensis, ke nur lin mi trovos en la domo.

Nun mi estas en varma, kara loko, kun ĉarmaj geamikoj, kiuj etendis al mi la brakojn. Mi havis multon por diri kaj aŭskulti.

Lina Gabrielli

\*\*\*\*\*

### El "Pensoj kaj Protestoj" de Feiko Munniksma :

Kupeo trajna,  
homoj en komuna kaĝ'  
sen vorto ajna

Povra bovido,  
buĉata post grasigo  
pro hom-avido


Esper' : balzamo  
por vundo senkuraca;  
suĉvol' sen mamo

Morti tutsola  
jen ekzisto-sorto en  
vivo ja fola

\*\*\*\*\*

### NASRUDIN

Nasrudin havis boaton por porti homojn trans la riveron. Komence de veturo pedanto demandis : "Ĉu estos grandaj ondoj?" "Mi nenion scias pri tion", Nasrudin respondis. "Ĉu vi ne scipovas gramatikon?" "Ne", la majstro diris. "Do vi perdis duonon de la vivo". La majstro diris nenion. La rivero estis larĝa. Baldaŭ ekŝtormis, kaj la boato estis akvoplana. "Ĉu vi scipovas naĝi", Nasrudin demandis la pedanton. "Ne". "Do vi perdos la tutan vivon."



# esperanto ne povas venki !

Jes, malgraŭ ĉiuj klopodoj de la esperantistaro ĝisnunaj nia afero ne prosperas (tiu ĉi frazo estas klaĉklišo, kiu atestas grandege la klasikan kulturon esperantistan de la aŭtoro). Do, post scienca ekzameno, kiu daŭris dek kvin ĝis kvindek jarojn, mi alvenis al tiu plorinda konkludo: Esperanto ne posedas "Bonan Ŝancon" - kontraŭe al la titolo de libro (sufiĉas scii nur la librotitolon por ekposedi la enhavon : tiu dua punkto demonstras plej amplekse la rigore scian spiriton de la verkinto laŭ la nunaj etik(et)aj normoj). Sed por ne tedi la leganton - se tiu Gutenbergrasano ankoraŭ ekzistas - per statistikoj kaj simplaj vortoj kiel redundanco, kongruo, signifanto/signifato aŭ preparolante la ambaŭflanke tensian ikonikon / parol-aŭdivecon (tiu tria frazo - sensignifa - plejege pravas la sciencisman valoron de la skribanto) - mi substrekos nur kelkajn tute ne ĝisfunde studitajn punktojn (antaŭ ol mi fundamente studis ilin). Jen :

### I. Pri sociolingvistiko

Ĉiuj grandaj lingvoj evoluis surbaze de granda popolo : la reĝo kaj lia kortego - nur ili estas lingve rajtaj leĝdonantoj. Ĉi-riate Esperanto fiaskos. Do : ALVOKO AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ : "Rapidu, ne hontu pri tio, sed se vi konas inter viaj amikoj baronon, princon, markizon... varbu lin, ke li ekstudu nian lingvon kaj parolu ĝin en la palaco de P. aŭ la kastelo de K. Poste ni fieros : nia lingvo estas parolata de markiz(in)oj Blankpugo kaj Belbuŝo en la fama vesper(t)-balo ĉe Silentukemiparolu.

Kaj simile - aŭ simie - al la angla ni posedos "akceptitan Esperanton" aŭ "Reĝesperanton", tuj kiam unu el vi varbos reĝon. Ek al laboro! Kaj rapidu, la fia demokratio elpuŝas for ĉiujn reĝojn."

### II. Religilingvistiko (aŭ Varbkomisiono)

Pere de misioj kaj misiistoj la (du) ĉefaj lingvoj disvolviĝis internacie. Do, kamaradoj, se vi konas tiujn stultajn junulojn, kiuj foriras de la seminario, diru al ili : prenu tiun Biblion (la Esperantan!) kaj relernu teologion ktp kaj iru Esperantpreĝi en ĉiuj landoj al ĉiuj nacioj...**Tamen**, ne forgesu diri al ili : Ekzistas dek kvin dogmoj sed unu inter ili estas nepre nekritikebla, la akuzativo. Do, se vi ŝatas bruligi homojn, vi certe laboros (- eterne!), aŭ eĉ vi povas estri la Inkvizicion, enirante en la Akademion. Sur tiu kampo murdemveka oni povas multe kaj efike varbi.

### III. Imperiismlingvistiko

Ni devas praktiki imperiismon! Kiamaniere? Unue : krei armeon da ŝtelistoj, murdistoj, iun veran krim-internaciularon, kaj ataki iun etan landon (ekzistas ankoraŭ kelkaj, sed ne prokrastu!). Tuj post la buĉo de ĉiuj loĝantoj la estro deklaru : "Laŭ la decido fare de la popolo mem, la popolo de tiu lando elektas min reĝgeneralo. Nun nia lando kaj mia voĉo, pardonu, la voĉo de la tuta popolo petas la aliĝon al UNO, UNESKO ktp, se ne, laŭ la rajtoj kaj devoj de nia popolo ni devus ataki aliajn landojn per niaj N-bomboj liveritaj de niaj amikoj."

Kelkajn tagojn poste : "Fieru popolo! Ni estas membro de UNO. Malgraŭ la enket-komisiono, kiu malkaŝis al la tuta mondo la morton (senkaŭzan) de ducent mil homoj el la ducent mil dudek loĝantoj de nia lando (la dudek estas en frenezulejo), la Internaciaj Instancoj akceptis nin varmkore : ni estas vere la plej ŝablona meza tipo inter ĉiuj ŝtatoj aliĝintaj". Kelkajn tagojn poste : "Granda Evento, dank'al nia ĉantaĝo per la N-bombo, ni povas deklari, ke Esperanto estas akceptita kiel internacia lingvo nepre studata far ĉiuj homoj, se ili ne volas esti buĉataj vive sur la verdstelo (neologismo, negramatika : nova ilo por torturi homojn kvin-pintile).

### IV. Stilistiko. Belliteraturo. Historietlingvistiko

Evidente ne sufiĉas por unu lingvo esti adoptita kiel mond-lingvo. Ne tre gravas la fakto - nepre deviga tamen - ke kelkaj kamaradoj varbu kelkajn reĝojn, princojn..., ke aliaj varbu episkopojn... Nepras ja, ke tiu lingvo estu "lingvo de kulturo kun historiaj bazoj". Pri la historio, dank'al la plenumo de la unua kaj tria punktoj, sufiĉas. Sed pri la kulturo? Verdire, la dua punkto alportas ion : kulto, sed la uro? (Ne pensu pri la ino, kiu solvas ĉiun historian problemon!). Do

restas ĉiam la solvendaĵo : kulturo?? Tie ĉi lamas Esperanto (ne! : lamegas). Ĉar mankas, ekzemple en la esperanta gazetararo, la plej grandaj ĉefgazetoj per kiuj (en la grandaj nacioj) ĉiuj legomvendistoj, fiŝistoj fake pakas (kia peko!) siajn aĵojn. Jes, granda manko! Oni ne povas legi ĉefartikolojn kiel : "S-ro X mortigis S-ron Y" aŭ "Princino X malvarmumis" aŭ Reĝino Q sterniĝis antaŭ Papo W". Sed ho ve! Skandalo! Vidu, en nia Esperanto mankas la literoj X, Y, Q kaj W! kaj ni pretendas posedi kulturlingvon! Fi! Fu!

### V. Optimala ortografio

Nia ortografio estas simpla : ERARO, kiu mortigos Esperanton. Ĉiuj grandaj kulturlingvoj posedas ortografion tute arbitran, vere kontraŭnature, amplekse artefaritan (la hispana? la itala? la germana? ĉu kulturlingvoj ? Via kapo nebulas! la rusa ? komunista, do jen la plej granda lingvistika pruvo de netaŭgeco!). Do finfine la franca kaj angla lingvoj estas kulturlingvoj nur per siaj malfacilegaj ortografioj. Feliĉe, samideano(j) pensis, pensas solvi tiun dornan problemon : krei fekortografion, pardonu, fakortografion. Laŭdata(j) estu (i)lia(j) nomo(j)! Problemo baldaŭ solvita kaj kompreneble MAJSTRE; sed ne nur malfacileco donas kulturon al lingvo.

### VI. Tago de la Libro

Alia problemo : nur la neintelligentuloj legas, la intelligentaj denaske ĉionscias (kiel la francoj). Samideanoj ĉesu legi sed parolu pri la libroj, altnaze, tiel vi montros al aliaj la kulturan valoron de nia lingvo. Facila solvo !

### VII. Semantiko

Kulturlingvo nepre devas posedi slangon : tiupunkte Esperanto fiaskos. Do, propramane mi elmalkas mian grizkremujon kaj elŝprucigas al viaj fiokuloj tiujn ajnajn elcerbumaĵojn :

"Elen, vi aĉaj porkoj; ne merdplenigu viajn kalsonojn, jen viaj voruoj kaj fek! gemerduloj! kial fekaĉi, timfurzuloj? Vi kotuloj de miaj du! Aĉa fiularo, mi alfaŭkis vin! Ĉu surda furzulo postaĵe zigzagas por rekte elmerdi! Aĉ! Ĉiuj en la grandan merdujon, porkulaĉoj... ŝprucfekuloj..."

"Nekacebla" tiu prozo : do ege valora kulturpunkte! Sed samfekujanoj pri tio mi fidus je viaj kapablecoj (ne necesas la "Atestoj pri ..."). Do lavange slangu ĉiukaze por atesti la kulturan valoron de Esperanto....

Daŭrigota en venonta "Laŭte!" (aŭ "Faŭke"?)  
Noto de la Redaktoro : Lastmomente telegramo anoncas bedaŭrindan morton sub fake slanga lavango de nia ekskunlaboranto. Novaĵo historia. Pli da informoj en nia venonta numero! Ne pre doas, ke ni presu la sekvon :

### VIII. Erotiko. Pornografio : Kiu kurâgos rajdi sur leonino ?

Pleje mankas en nia belliteraturo ĉefverkoj kiel : "L'O bona", "Histori' d' O"... Ni preterlasis gravan ŝancon! Imagu erotikan libron esperantlingvan, kondamnitan de l' Eklezio (iu ajna) aŭ cenzurita de iu ŝtato : Kia varbado senpaga pere de la amaskomunikiloj! Sed, plorinda afero! nun kion eltrovi por esti cenzurita? Ĉio de la ino, de la geo estas senvualigita. Tamen restas arta traduko de la grandaj ĉefverkoj erotikaj (amoraj antologioj araba, ĉina, japana, hinda... k.c. - elparolu kaca), vidu, vere internacia, eble sennacia, ĉar UNIVERSALA tiu GEASOCIO (ne germana sed lertmana). Tion ege pruvas niaj interkaciaj kongresoj plejefike! Kiu kuraĝos enpenetri en tiun arton? Necesas evidente nur fikuloj - pardonu : fakuloj - kiuj praktikas multajn di-versajn langojn - ne lingvojn. Alidire, nova Peter Peneter, sed ĉu ne jam kreskis Peneteridoj, kiuj heredis de sia patro la ge-ni-econ ? Nepras Enketkomisiono.

### IX. Politiko : Kiu kuraĝos rajdi sur Leonid' ?

La oka voj-montra punkto donas nur poli-tiklon. Ĝis nun ne ĝisSATE nutris nin kelkaj artikoletoj aŭ libroj pri-kaj pro-politikaj. Jes ja, grandan dankon al Prezidento Maŭ Zedong! Pri aliaj vidpunktoj nur L'hienin' aĉa ridpunkto! Pri la Stelin' de la politika scenejo : nenio ! Ĉu oni vivas en mondo sen klasbataloj? sen ekonomiaj streĉoj? sen kapitalismaj imperiismoj? Ĉu la geesperantistoj nur ege vage agas, kiam necesas nepre plena preno de penoj de niaj nepoj antaj kaj ontaj, tie ĉi kaj ĉi tiam?

### X. Diskriminacio

Laŭstrukturo ĉi vorto signifas "nacio (en kiu oni povas) krimi dise (ne kontraŭleĝe sed laŭleĝe)".

Evidente neŭtrala, statute, la E-a movado! Kaj, ĉar laŭleĝa krimo ne estas krimo, geesperantistoj silentu aŭ aplaŭdu. Nur nin ege skandalas la envortarigo neologismoj. Tiuokaze kelkaj eĉ aĉmire je la admiro de aliaj, mirinde ŝerce nigrigas novan serĉon laŭtipe : "far : tia farso fie farĉas karan kernan karon de l' fundamento, ĝisostuloj-taĉmento : koton plenmane al la fardiristoj!"

### XI. Tria Mondo. Tria aĝo. Tria Regno

Verdire, ĉar spure restas en nia lingvo dualo (ambaŭ, paro, duo...) ni kreis novan semantikgramatikan kampon : la "trialo" Ĉiu triaĵo enhavas sencon jenan : nekulturita, subevoluinta, miscivilizita, mortproksima, unuvorte eksjuna. Tio evidente ne estas diskriminacio, ne estas alivizaĝa rasismo, sed Historia fakto, do fato, al kiu ni devas submetiĝi kaj submeti tiujn landojn aŭ personojn triaecaĵn.

Doe, tuj konsentos vi, ke E-o estas trialingvo, ĉu ne? post la angla kaj la franca ? Oni petu de tiuj lingvanoj almozojn : provizojn da vortoj, analizojn, devizojn, avizojn... kaj alvenos kotiz-krizoj!

### XII. La dekdua meznokte : glim-tim-krim-horo noktmeza

Imagu vi mem la dekduan plagon por niaj movado kaj lingvo. Konsultenda : Apokalipso 17 : 5 "Babel la granda, la patrino de la abomenindaĵoj de la Tero".

### XIII. Bonŝanca nombro

Malgraŭ tiuj dek du VEOJ esperas mi, ke ĉiu el vi kor-karaj samideanoj - por la lanĉo de tiu varbkampanjo necesas, ke aro da ĉampanjokorkoj tondru, poste al vi fulmos ideoj kork-araj - ... kieas mi ? ha! jes... ke ĉiu el vi klopodu certigi ke Esperanto en la plej VIVE VIVA VIVO VIVU !

Mihajlov Saljuloviĉ Semideojnlaŭvic.

-----  
Maljunulo rakontas :

### LA POPOLO

Okaze de riparado de mia aŭto, en Pariza ĉirkaŭaĵo, mi foriris al iu gastejo por malgranda manĝaĵo. Survoje mi renkontis maljunan preĝej-filinion elirantan el la preĝejo.

Ĉar ni kuniris mallongan vojon, mi ŝin demandis : "Kiel vi voĉdonas dum balotoj?"

"Ho ve, ŝi respondis al mi, je mia aĝo, nun, mi ĉiam voĉdonas **dekstren..**"

Mi respondis : "Se la dekstra venkos, vi perdos la moderan luprezon de via loĝejo, perdos la senkoston kuracadon, via emerita pensio malgrandiĝos, kaj aliaj aferoj por via vivo..."

"Ne, ŝi respondis, ... ĉion ĉi tion la **maldekstruloj** malpermesos..."

Per tiu ĉi respondo mi komprenis la hodiaŭan dekstran vojon de nia popolo.

-nn-



## VORTOJ DE MALJUNULO

-----  
valo  
-----

### Verdkata saŭdado

Antaŭ nelonge mi eksciis pri la morto en januaro 1983 de René Dubois, 97-jara, la plejaĝa kaj unu el la plej fruaj kompanianoj de la Verda Kato.

La Verda Kato! Mi elvokas el mia memoro tiujn vesperojn de la jaroj 20 kaj postaj en la unua esperanta kabareto fondita de Raymond Schwartz kun kelkaj geamikoj.

Ĝin vizitadis, kun multaj junaj kaj mezaĝaj spektantoj, kelkaj el la eminentaj pioniroj, kiuj antaŭ 1914 animis la brilan "francan periodon" de la movado: Cart, Grosjean-Maupin, Aymonnier, Esselin, Archdeacon, de Lajarte, F. de Ménil, kiu komponis la muzikon de "La Espero", Bastien, Bobin, Warnier, Gouttenoire de Toury, Eyquem... Iam ni akceptis Edmond Privat, veninta de Genevo, kie li kun Hans Jakob, de post la morto de Hodler, gvidadis la prosperan UEA-on.

Mi rekreas en mi kaj ĉirkaŭ mi per la internaj sentumoj tiun gajan etoson. Mi vidas vin sur la ĝoja podio, amikoj Schwartz, Dubois, Echard, Nels, Marchand, Pravatiner, ĉiuj junaj, viglaj, vervaj, kaj vin, malpli juna - jam emerita - sed ne malpli junece impeta, grumblema ĝendarmo Le Cornec kun viaj dikaj lipharoj. Mi aŭdas tre distinge la apartan tembron de ĉiu el viaj voĉoj, kantantaj, komedian-taj aŭ familiare parolantaj, ofte satire, ĉiam sprite. Sonoras la profundaj basoj de la blinda Masselier kaj de la alta kataluna kamarado Solsona. La arda poeto Salo Grenkamp deklamas versojn aŭ kantas polajn popolkantojn de li esperantigitajn, kaj lia perfekta akcentado nete martelas la silabojn.

Mi vidas viajn ridetajn vizaĝojn, amikinojn. Mi aŭdas, kara Marga Rineta, vian agrablan voĉon sprite distilanta humurajn kanzonojn. Mi aŭdas vian kortuŝan belkanton, bela Jeannette\*. Vi parolas, vi ĝentila britino Cecilia Sampson, kaj vian parolon apenaŭ spicas ereto da angla tono. Vi ridas, vi kara pola

judineto, petolema Roswadowska\*\*, kaj via rido sonas kiel trilo de najtingalo.

En la printempo de 1925, la 25an de marto, ni troviĝis kvardeko, generacioj miksitaj, ĉe la "Unua kongreso de la amika rondo de la Verda Kato". Dekon da jaroj poste, la pli junaj retroviĝis preskaŭ ĉiuj, kun kelkaj pli junaj novuloj (inter ili la klera Roger Bernard kaj la ĉarma fratino Simone ĉe la ĉiusemajnaj kunvenoj de la redaktistaro de "la Pirato". Kvaronjarcenton poste, ni ankoraŭ retroviĝis ĉe la "Koboldoj" en Montmartre, sed, ho ve! ne plu ĉiuj. Jam la morto falĉis en niaj vicoj. Mankis la veterano Le Cornec, mankis Echard. Pereis en la milita tempo Solsona, Grenkamp, Roswadowska, viktimoj de la nazia barbareco, kiel Lidja Zamenhof, Ruth Sandilowitz, S-ino Kitas, kaj tiom da aliaj judaj geamikoj kaj kontraŭfaŝistoj.

En la postaj jardekoj vice forpasis Schwartz, Lobut, Nels, laste Dubois. Nun restas tre malmultaj el tiu amikaro, kaj tiuj ankoraŭ pluvivantaj povas nur gustumi la dolĉ-amaran plezurojn de la rememoroj.

Kaj vi, gejunuloj, kiuj ne estis naskitaj en la unua duono de la nuna jarcento?

La Verda Kato, la Bolanta Kaldrono, la Pirato, la Koboldoj pasis kiel kometoj traflugantaj la parizan ĉielon. Ĉu sen-spure? Feliĉe ne. Raymond Schwartz lasis al ni siajn verkojn\*\*\*. En tiuj paĝoj kaj en la kolumnoj de la kajeroj de la efemera Pirato kuŝas la esenco de la kabareta heredaĵo. Kvankam kelkaj partoj perdis sian aktualan karakteron, la spicaodoro ne forvaporigis. La "gaja muzo" ne dronis en definitiva silento. Pere de tiuj atestoj la junaj generacioj povas eltrovi kaj iom ekkoni, kio estis la tiama esperanta kabareto. Dank'al ili daŭre vivas la Verda Kato.

\* Jeannette Le Cornec, filino de la ĝendarmo.

\*\* Roswadowska. En "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo" mi erare nomis ŝin Rozanovska. Ŝi transskribis pole sian oficialan nomon (Rotstadt), kiel Grenkamp esperantigis sian (Kornfeld).

\*\*\* Verdkata Testamento, La Stranga Butiko, La Ĝoja Podio, Kun siaspeca spico. Schwartz verkis ankaŭ du romanojn: Anni kaj Montmartre kaj Kiel akvo de l'Rivero.

----

Post dutaga fulmotondra pluvado kaj pluraj tagoj da varma suno, en kreska fazo de la luno, baldaŭ aperos fungoj en la apudaj arbaroj.

Antaŭ 30/50 jaroj, estis por mi plezure kolekti diversspecajn fungojn sub kverkoj, fagoj kaj kaŝtanoj. Nun, en multaj lokoj de la Nacia Parko de Cevenoj, tiu kolektado estas malpermesata, same kiel tiu de framboj, mirteloj kaj kaŝtanoj.

Kutime, mi malŝatas malpermesojn. Mi volonte adoptus la sloganon de la kulturrevolucianoj de majo 1968: "Estas malpermesate malpermesi".

Tamen, en la nunaj cirkonstancoj, mi aprobas tiun ĉi malpermeson. Kial?

1. Ĉar de post la disvastigo de la aŭtomobila trafiko, multaj maldiskretaj urbanoj veturas 50 aŭ 100 km kun grandaj sakoj, kaj prirabis la arbarojn, lasante nenion por la lokaj kampuloj.

2. Ĉar tiuj kampuloj, cevenaj montaranoj, pene perlaboras sian ĉiutagan panon per kultivado de malgrandaj bienetoj kun malfekunda grundo. Per tiuj plukadoj ili havigas al si ekstrajn enspezojn, kiuj iome plibonigas iliajn magrajn vivrimedojn. Ni ne konkurencu tiujn malriĉulojn, ni, kiuj kompare povas rigardi nin preskaŭ kiel riĉulojn.

Tial, eĉ en la lokoj, en kiuj ne estas malpermeso, mi rezignis pri kolektado de fungoj, mirteloj, framboj kaj kaŝtanoj. En somerfino kaj aŭtuno, la marŝado en arbaroj, sen profitcelo, konsistigas sufiĉan plezuron, kiun ni povas ĝui sen malutili al iu ajn.

**Valo**

Florako, septembro 1984.

Solvo de la krucvortenigmo aperinta en L! 56 :

Hor. 1. GUTAPERKO. 2. RR. ĈAMO. 3. OT. ELIZIU. 4. TINTI. EL. 5. EKE. AMELO. 6. TUT. 7. KRITIKAD. 8. ADEKVATAJ

Ver. 1. GROTESKA. 2. URTIK. RD. 3. NENIE. 4. AĈET. TK. 5. PALIATIV. 6. EMI. MUKA. 7. ROZ. ETAT. 8. IEL. DA. 9. OKULOJ

Sin kompreni reciproke : ĉio estas en tio. Ne esti surda al akcentoj de fremda buŝo ; kapti la penson tra la sonoj ; scii kion diras la alia mizerulo kiel vi, suferanta kiel vi, senigita kiel vi.

**SÈVERINE**

## VIDPUNKTOJ

Jam de sia infanaĝo Paŭlo konis Lina'n, la filinon de la najbaro. Kiel knabeto li ofte ludis kun ŝi, sed ofte ankaŭ disputis kun ŝi, kiam iu ajn malkonkordaĵo starigis unu kontraŭ la alia. Ĵu pli ili kreskis, des pli ofte okazis tiaj disputoj inter ili. Iam Paŭlo eĉ vangofrapis la knabinon, kiu foriris plorante. Ekde tiu tago ambau infanoj ĉesis ludi kune. Ili estis dekdujaraj, kio ja estas la plej maloportuna aĝo por la rilatoj inter geknaboj. Dekdujaruloj kutime malestimas samaĝajn knabinojn, kiujn ili opinias stultaj, ne konsciante pri sia propra stulteco !

Sed ankaŭ tiam disiĝis la geknaboj, ĉar Paŭlo forlasis la urbon por iri al gimnazio en apuda urbo, kie li studis kiel interna lernanto dum kelkaj jaroj. Nur la dimanĉojn li pasigis en la gepatra hejmo, kaj ofte la farendaj taskoj por la lernejo ne ebligis al li eliri al la strato. Tiel li ne plu havis okazon revidi la iama ludkunulinon.

Iam li tamen faris promenon, ĉar belega printempa vetero allogis lin eksteren en la naturon. La suno kvazaŭ sorĉe plibeligis la ĉirkaŭaĵon de la urbeto, kaj la junulo (li nun estis deksesjara) plenpulme spiris la vivigantan aeron kaj sentis sin plene feliĉa. Tiam li renkontis belan knabinon, kiun li unue ne rekonis. Ŝi estis Lina, la filino de la najbaro, kiun li preskaŭ forgesis. Nerekonebla ŝi estis nun : la iama knabineto fariĝis rava junulino kun belaj okuloj, longaj blondaj haroj kaj svelta fleksa talio. Tia beleco impresis al Paŭlo, kiu ruĝiĝis kaj eksentis fortan batadon de sia koro. Post momento li tamen rekonis ŝin kaj salutis ŝin kun rideto. "Estas vi, Lina ? Mi hezitis rekoni vin... pro via nova hararaĝo!" - "Kiel vi fartas, Paŭlo? Mi tuj rekonis vin, ĉar vi restis ĉiam la sama!". Certe, kiam knabo fariĝas junulo, li malpli ŝanĝiĝas ol knabino, kiu viriniĝas. La metamorfozo de Lina ravis Paŭlon, kiu malkovris novan personon, plaĉaspektan, admirindan, eĉ amindan! La detalo, kiu plej impresis al Paŭlo, estis la brusto de Lina, kiu nerezisteble allogis liajn rigardojn, el sub la maldika ŝtofo de la freŝkolora printempa robo.

Paŭlo kaj Lina daŭrigis sian promenon kune, amike babilante, kaj la dolĉa voĉo de Lina estis por la knabo plia allogaĵo, kiu ekflamigis lian koron. Kiel malproksima estis la vangofrapo, kiun la bubo donis al la knabino ! Anstataŭ frapi



tiun freŝan vangon, Paŭlo pli volonte kiskus ĝin! Kio do okazis al Paŭlo, ĉu amo, deziro ? Li mem ne kapablis distingi tion. Sed li sentis sin feliĉa, kiel neniam antaŭe!

Post tuta horo da promenado kaj amika babilado, Paŭlo kaj Lina revenis ĉiu al la propra hejmo.

Sed la bildo de Lino ne forlasis Paŭlon, kiu de nun daŭre pensis pri la ĉarma silueto. Enlitiginte, li ne kapablis ekdormi kaj la pensado pri la belulino obsedis lin ĝis malfrua horo de la nokto. La vizaĝo kun la bluaj okuloj, la abundaj blondaj haroj, la rideto de Lina kaj ĉefe la brusto de lia amikino restis obstine en lia memoro. Precipe la penso pri ĉi-lastata parto de la dezirinda korpo daŭre okupis lian menson. Dum sia maldormo, li klopodis imagi ŝiajn mamojn nudaj kaj revis, ke li arde, ambaŭmane karesis ilin. Tiuj sentoj estis tute novaj por Paŭlo. Sed nur la duondorma stato, en kiu troviĝis Paŭlo, ebligis ĉe li tian senbridigon de liaj pensoj. Lia timida naturo estis, en la normala vivo, sufiĉa bremsilo por eviti skandalan konduton. Paŭlo estis serioza knabo kaj liaj revoj tute ne riskis iĝi realaĵo!

Post la promenado, Paŭlo estis proponinta al Lina novan renkontiĝon kaj ŝi volonte akceptis. Jam la morgaŭan tagon ili retrovis unu la alian kaj denove promenadis en la kamparo. Tiaj promenadoj okazis ĉiutage kaj ege feliĉigis Paŭlon, kiu trovis sian amikinojn pli kaj pli bela kaj ĝuis ŝian apud-econ.

Sed iun tagon pluvigis, kaj tio malebligis la kutiman promenadon de la gejunuloj. Tiam Paŭlo proponis al Lina veni al li por rigardi liajn fotojn. Lina akceptis kaj la knabo venigis ŝin al sia ĉambro. Ambaŭ sidiĝis ĉe tablo kaj rigardis la fotojn, kiujn Paŭlo faris, kun bona amatora talento. Ili sidis apude kaj Paŭlo enmanigis al Lina, unu post la alia, la fotojn, kiujn li iam faris. La knabino admiris ilin kaj komentis, petis klarigojn. Le gejunuloj sidis ŝultron ĉe ŝultro, kapon ĉe kapo, kaj tio kvazaŭ ebriigis Paŭlon, kiu sentis la varmon de la junulina korpo. Lia rigardo plonĝis en la dekoltaĵon de Lina, glitis sub la robon, inter la mamojn de la knabino, tiuj mamoj, kiuj tiom ekscitis lian deziron! Tiu vidaĵo subite mutigis lin, kaj Lina, kiu ĵus faris al li demandon, rimarkante, ke li ne respondis, turnis la kapon al li kaj vidis tiam, ke li gapis al ŝia brusto. Tiam ŝi ekruĝiĝis pro kolero kaj fortege vangofrapis Paŭlon. Ambaŭ ekstaris, Paŭlo konfuzite kaj Lina furioze, kaj ŝi decidapaŝe forlasis la ĉambron kaj la domon de Paŭlo.

Post tiu skandalo, la du gejunuloj ne plu renkontiĝis.

Tiel frakasigis, subite, la feliĉo de Paŭlo. Li nun konsciis, ke li fuŝis ĉion kaj amare riproĉis al si sian konduton, kiu bedaŭrinde metis finan punkton al la plej ĉarma idilio. Ho ve! Tro malfrue! Li devis rezigni pri la amo de Lina, sed tio, kion li sentis al ŝi, ne formortis kaj li ekkonis la turmenton de la rimorso. Li fariĝis malĝoja kaj havis la certecon, ke li neniam plu amos alian knabinojn ol Linan, kies bildo plenis lian tutan koron. Kaj tiu amo al ŝi iĝis tiom pli ekskluziva, ke ĝi nun estis nebla, nereciproka.

Intertempe lia familio transloĝiĝis al alia urbo. Tiel li ne plu vidis Linan, kaj preferis tion, ĉar renkonti sian amatinon (ĉar li ja ĉiam amadis ŝin!) ŝajnigantan ne koni lin, estis por lia amanta koro kruela turmento.

Pasis kelkaj monatoj. Certe li ne forgesis ŝin, sed tamen ŝia bildo iom nebuliĝis en lia memoro. Dum somerferioj li akompanis la gepatrojn al la marbordo por unumonata restado. Tuj post la alveno, li iris al la plaĝo por bani sin kaj sunumi. Ĉar li dum multaj jaroj ne feris ĉe la marbordo, surprizis lin la nova modo de la virinoj, kiuj surhavis nur minimuman bankostumon, kiel la viroj, kaj elmetis siajn nudajn brustojn al la sunradioj kaj samokaze al la rigardoj de ĉiuj. Komence tio iom ŝokis lin kaj li eĉ ne kuraĝis rigardi. Tamen, vidante neniun ĝenon sur la vizaĝoj de tiuj najadoj, li iom post iom aŭdaciĝis kaj rigardis tiun edenan spektaklon, tute novan por li. Liaj okuloj flirtis papilie de unu brusto al alia kaj li konstatis diferencojn inter tiuj de mezaĝaj matronoj kaj tiuj de pli junaj virinoj aŭ freŝaj junulinoj. Liaj rigardoj restadis pli longe sur ĉi-lastaj kaj tiu vidaĵo donis al li veran ĝojon.

Vidante la indiferentecon, kun kiu tiuj inoj lasis rigardi siajn mamojn de kiuj ajn nekonatoj, li subite repensis pri la sceno kun Lina, kiu rompis ĉiujn rilatojn kun li pro nura rigardo sub ŝian robon. Tiu penso pri la perdita feliĉo redolorigis lian koron.

Sed jen li ekvidis iun belan knabinojn sidantan sur la sablo. Ŝi estis pli bela ol ĉiuj, kiujn li vidis ĝis nun kaj ŝia brusto estis perfekta. Ĉe tiu vido freneze ekbategadis lia koro, ĉar li subite rekonsciis ŝin! Jes, estis Lina! Tiu sama knabino, kiu tiel koleriĝis pro nura ekrigardo lia al ŝia sino, nun elmontris sian preskaŭ tutan korpon sub la somera suno kaj centoj da homoj povis admiri ŝian radiantan belecon! Unufoje Paŭlo povis vidi la belformajn kaj firmajn mamojn de sia iama amikino, jam sunbrunitajn!


Lia konfuzo estis granda kaj li ne sciis, kion fari. Kia

estos ŝia reago, kiam ŝi vidos, ke li rigardas ŝin? La sango kolorigis lian vizaĝon kaj li eksentis la amon forkuri el la plaĝo kaj neniam plu reveni!

Sed tiumomente Lina turnis la kapon kaj ekvidis lin. Granda surpriziĝo aperis unue sur ŝia vizaĝo, sed baldaŭ ekfloris bela rideto sur ŝiaj lipoj kaj ŝi diris: "Paŭlo, estas vi? Kia ĝojo revidi vin ĉi tie!" Kaj tion dirante, ŝi leviĝis kaj alpaŝis al Paŭlo kun etendita mano. Ambaŭ gejunuloj manpremis reciproke, sed en sia ĝojo revidi Paŭlon, Lina eĉ kisis lin survange. Tio estis ŝia unua kiso al li. Dum ŝi kisis lin, ŝia mamu tuŝis la bruston de Paŭlo, kiu en sia embaraso restis muta kaj eĉ ne pensis kisi ŝin. Rimarkante tiun sintenon, Lina memoris pri la lasta sceno inter ili. "Jes, Paŭlo, mi komprenas. Mi vere **stulte** agis tiam. Vi devas pardoni al mi, ĉar vi certe suferis pro mi. Tion mi sincere bedaŭras. Nu, kara Paŭlo, ni denove estu geamikoj kaj ni restu. Malprave mi tiam ne akceptis la omaĝon de via rigardo. Nun mi komprenas, ke vi ne havis malpuran intencon. Ankaŭ vi plaĉas al mi, ĉar vi estas bela knabo. Ni ne fuŝu nian feliĉon! Ĉu vi deziras nun bani vin kun mi?"


Kaj prenante la brakon de Paŭlo, ŝi iris kun li en la maron kaj baldaŭ ili naĝis kune, kiel la plej bonaj geamikoj en la mondo.

**KRUCVORTENIGMO** de P. Signoret (r = nur la radiko!)



- Horizontale** : 1. Tempdivida sistemo. 2. Tekstopeco. Parteto(r). 3. Fonetike: muziksigno. Literonomo. Pligrandigilo(r). 4. En ili moviĝas la piŝtoj. 5. Ĝi floras rozkoloro sur malfekundaj grundoj. Pli longe. 6. Artikolo. Akuzative: korelativo. 7. Afable petas. 8. Kortega ceremoniaro(r). Fonetike: malutilo. 9. Subita ŝanĝiĝo.
- Vertikale** : 1. Administra altrangulo(r). 2. Delokante, movante al si. 3. Person-pronomo. Ĉina mezurunuo(r). Ekzisti(r). 4. Papa korespondaĵo. 5. Ĝi lumigas niajn noktojn. Inverse: Letono(r). 6. Konkludilo. Neforigebla desegnaĵo(r). 7. Skrapis la Personpronomo. 9. Metallo(r). Neŝparebla

teron. 8. Flavkapa eteta birdo. trezoro.



**PRI SOCIALISMO, LIBERECO KAJ PUGPAPERO**

Ĉar nia samideano Paŭlo rekte demandas min, mi provos respondi liajn demandojn :

- jes, eblas vidi en Francio kontraŭsonajn aŭ antimilitaristajn filmojn, eĉ en ordinaraj kinejoj. Ekzemple mi vidis: . "Missing" (mankanta), filmon pri la imperiismo de Usono en Latinameriko. Tiun filmon mi vidis en kinejo "Le Club" en Strasburgo.

. "Avoir 20 ans dans les Aurès" (esti 20-jara en Aurès) en la kinoklubo de la protestanta paroko en Clermont-Ferrand. Temas pri filmo kontraŭ la franca militarismo en Alĝerio dum la tempo de la alĝeria milito.

. "RAS", filmon pri la sama temo. Mi vidis ĝin en ordinara kinejo, sed mi ne memoras en kiu urbo.

Mi scias, ke estis faritaj en Usono filmoj denuncantaj la usonan militon en Vjetnamio, sed mi vidis neniun, kvankam ankaŭ ili estis montritaj en ordinaraj kinejoj.

En Orienta Eŭropo mi iris nur unufoje en kinejon, por vidi "Notre-Dame de Paris" laŭ la romano de Victor Hugo. Tio estis en Oranienburg, dum vizito al amikino. Kun tiu amikino mi korespondis dum 9 jaroj, kaj poste ŝi, laŭ mencio sur la reveninta letero, rifuzis miajn leterojn. La motivon de tiu rifuzo post 9-jara amikeco mi verŝajne neniam ekscios. Do mi ne povas paroli pri kinarto en Orienta Eŭropo, ĉar, kiel eble miaj legantoj rimarkis, mi kutime parolas pri tio, kion mi konas. Do mi ne parolos pri kinarto en GDR, sed mi povas paroli pri amikeco inter GDR kaj Sovetio : la edzo de mia amikino estis volontulo por labori en Kievo. Ŝi klarigis al mi, kial li fariĝis volontulo : ili estis geedzoj jam de 3 jaroj, ili havis 5-jaran filinon, sed ili ankoraŭ ne ricevis loĝejon por vivi kune. Ili esperis, ke reveninte el Kievo la edzo ricevos loĝejon por finfine vivi familie. Se li ne akceptus, li devus verŝajne atendi du jarojn pli. Ĉie en Oranienburg estis grandaj banderoloj pri la amikeco inter GDR kaj Sovetio. Do, atendante la revenon de sia edzo, mia amikino vivis ĉe siaj gepatroj. Ĉar mi scias, ke ŝiaj gepatroj eksgeedziĝis, mi demandis, kie vivas nun

la patro. Respondo : "Li nun ne ĉeestas, sed li loĝas en la salono, kaj mia patrino en la dormoĉambro" "Ĉu do la eks-edziĝo ne estas finita?", demandis mi naive. "Jes ja, sed mia patro ankoraŭ ne ricevis loĝejon por sola viro".

Mi neniam diris, ke Pollando estas infero, ĉar inferon mi neniam vizitis, kaj konsekvence mi ne povas kompari. Sed mi ja diras, ĉar tio estas vero, ke, post la edziĝo de sia frato, mia edzo, kiu estas polo, vivis en la ĉambro de sia frato kaj de sia bofratino, ĉar ne estis sufiĉe da spaco en la loĝejo. La gepatroj vivis en alia ĉambro, kaj la kuirejo ne havis fenestron.

Mi esperas, ke iam nia samideano Paŭlo rakontos pri siaj restadoj en Usono kaj Sovetio. Kiajn filmojn li vidis tie? Kion li opinias pri tio, kion li mem spertis?

- Mi tute ne scias, kial la sovetia scenigisto preferas vivi en Usono. Kiel mi tion scius? Mi ne konas lin, mi neniam estis en Sovetio nek en Usono.

- Se interesas la legantojn de "Laŭte!" scii, kial mi mem preferas vivi en Strasburgo, ol en Varsovio aŭ en Germanio, mi povas citi du punktojn, kiuj laŭ mia tako estas pli agrablaj en Strasburgo :

\* **pugpapero** : promenante en Varsovio kun mia fianĉo, mi vidis longan atendvicon antaŭ magazeno. Mi demandis, kion oni vendas, mia fianĉo informiĝis, oni vendis pugpaperon. En magazeno Suma en Strasburgo-Neudorf, ne eblas aĉeti unu pakon da pugpapero, ĉar oni vendas ilin minimume sesope. Tio ne gravas, ĉar male de joghurtaj pugpapero bone konserviĝas. Ankaŭ en FRG estas pugpapero, kompreneble, sed ĝi ne estas tiom komforta, kiom la franca (almenaŭ laŭ la takso de mia propra pugo), tial kelkfoje mi vidis kehl-anojn, kiuj venas aĉeti pugpaperon en Strasburgo-Neudorf.

\* **lakto** : mi jam pritraktis tiun temon en "Laŭte!" : en Berlino Okcidenta, eble estas lakto, sed ĝi ne aĉetebblas en stacidomo Berlin-Zoo : tie aĉetebblas grandioza germana matenmanĝo, sed ne unu glaso da lakto. En Berlino Orienta, ĉe Aleksandra Placo, estas laktotrinkejo, kie en 1979 unu glaso da lakto kostis 30 GDR-ajn pfenigojn (sed mi ne scias, kio estas la ordinara salajro de GDR-ano). En Strasburgo, oni vendas lakton en ĉiuj trinkejoj.

Mi ne konkludas de tio, ke Strasburgo similas paradizon, ĉar paradizon mi neniam vizitis, kaj, kiel mi jam diris, mi ne ŝatas diskuti pri aferoj, kiujn mi ne konas. Sed mi ŝatas viŝi mian pugon post fekado, kaj trinki lakton.

Jakelino.

## Pri B.E.

*B.E. estas bonega ideo por progresigi E-on, sed se oni vere efektivigos ĝin, estos gravega reformo de la lingvo. Dek miloj da vortoj estus anstataŭitaj per novaj kunmetaĵoj.*

*Tamen tiu giganta reformo estas pli facile akceptata ol simpla evolueto de la formo de kelkaj literoj!*

*Pli efike estus forigi nur vortojn tute senutilajn kaj permesi la uzon de supersignaj skribado per simpla kaj racia metodo, kiam necesas.*

*E-o estas nun nur kluba lingvo. Por ke ĝi estu universala lingvo, oni povu uzi ĝin ĉie kaj ĉiel. La komencantoj baldaŭ fariĝus lertaj, se ili povus uzi E-on ankaŭ ekster siaj kluboj.*

*Ne pli ol 1% el la ekzistantaj skribaĵoj kaj presiloj povas uzi E-on sen multekostaj aranĝoj aŭ penigaj trukoj. Estas neniam estonto sen iom da progresiga kaj moderniga evoluo.*

P.M.G.

## Bof ! (2)

Por la paciencemaj ĉio ĝustatempe okazas. Finfine, post nur du jaroj kaj duono, fakuloj respondis mian petalvokon pri la cirklokvadrato. Kion ili respondis? Nome, ke laŭ matematikista vidpunkto, la problemo pri la cirklokvadrato estas nesolvebla. Nenio nova sub la Suno : tion mi mem rebatis al Julio Štrumpfo en la unua "For la frenezulon!". La matematikistoj ja ne degnas malaltiĝi ĝis la praktika kampo kaj paroli kiel simplaj mortemuloj. Ili daŭre svingas siajn hermetikajn teoriojn samkiel la Biblia Ĉefanĝelo svingas sian flamantan glavon antaŭ la Edenenirejo. Konstateble, ili ne volas kompreni, ke rifuzante ĉian alian koncepteblecon, ilia unuflanka negativa vidpunkto konsistigas faktajn dogmigadon kaj tabuigadon de la problemo, kaj tiel provizas min per plua motivo por ne Don Kifotumi kaj albatali ventomuelilojn. Mi nur plu asertas, ke tiu problemo estas facile solvebla en praktika kampo, kaj fidas la sagacon de la "Laŭte"-legantoj, por ke ĉiu intereso mem solvu ĝin. Sufiĉas streki cirklon kaj kvadraton laŭ la kalkulkmaniero indikita en mia lasta artikolo, kaj zorge konsideri la skemon ricevitajn, por konstati, kiel facile estas geometrie efektiviĝi la cirklokvadraturon per nur rektilo kaj cirklo. Mi aldonas nur, ke kvadrato estas kvadratiĝinta cirklo, kaj ke cirklo estas cirkliĝinta kvadrato. Tio estas ja sufiĉa ŝlosilo por kompreni.

Persone, mi tro senbalastiĝis de ĉia mistikemo pri la

vorto "dio", por refali en mistikismon pri neekzistantaj Eŭklidaj punktoj sen longo, sen larĝo kaj sen dikeco. Hipotezo pravas nur post eksperimentada konfirmo. Kiam oni bonvolos montri al mi, kiel streki linion per neekzistantaj punktoj, mi certe revizios mian opinion.

Mi intencas nek propagandi, nek provi konvinki pri la praveco de la J.S-procedo, ankaŭ nek "inteligente distri" fakulojn, sed se iuj ĝin deziras, mi ĉiam pretas demonstri en "Laŭte", kiel solvi la problemon tiel geometrie, kiel aritmetike. Tiuj nur mem prezentu en "Laŭte" sian propran provon mem solvi la problemon, kiel memstarantaj SAT-anoj.

Mi diras, responde al tipe nepravigita kritiko, ke mi uzis Pi 3,1416 en mia lasta artikolo, ĉar, ne estante matematikista fakulo, mi zorgas esti komprenata de ĉiuj, kaj, tiucele, uzas nur kutimajn nociojn kaj esprimojn.

Sed por mi la vera Pi restas la racionala PI 3,1406, aŭ pli precize PI 3,1405224, kvociento de kvadrato, kies areo ekvivalentas tiun de cirklo, per la kvadrata radiuso ( $R^2$ ) de tiu cirklo, kio nepre necesigas la antaŭan aritmetikan solvodon de la problemo pri la Cirklokvadrato.

De du jaroj kaj duono mi asertas tion en "Laŭte", kaj neniu serioze rebatis min. Do, antaŭ ol pedante provi demonstri al mi, nun, la neprecizecon de PI 3,1416, estus ja preferinde malpli zorgi pri la "obstina Kvadraturisto", kaj pli pri liaj asertoj. Cetere, kiam oni scias pri la vera rilato inter la cirklo kaj la kvadrato, la nombro PI fariĝas nur kroma utiligeblaĵo.

Kompreneble, ĉio ĉi-supre skribita estos konsiderata de la fakuloj, kiel nura absurdaĵo. Sed, por mi misinstruita manlaboristo, kiu de pli ol kvardek jaroj, kaj ĉiam en izoliteco, pretendeme kaj obstineme zorgas pri la "universala lingvo" Esperanto, sen mem esti lingvistika fakulo (Honto al Mi!), unu absurdaĵo plia ja estas nur banalaĵo.

Anonima B.G.D. )Eymet(

## VOJINDIKILO

Post via priskribo de la amasiĝanta stoko de broŝuroj afiksianta la Laŭtejon, ("Ĉiam pli laŭte...") (L! 56), ne eblas tro laŭte laŭdi vian decidon, dediĉi energion prefere al reeldonado de sukcese disvendebaj eldonaĵoj ol al publikigo de novaj tekstoj. Ne hezitu! Vendu kaj vendu la jaman stokon, kaj produkto por vendo nur vendeblaĵojn! Tion mi subtenas.

Iom perturbas min, tamen, konstati vian emon reiri al la kutima situacio de monmanko. Konsternas min, efektive,

pensi ke vi serioze elpensas metodon redoni al, ekzemple, mi la valoron donacitan al la kapitalo de SAT-BS por helpi ebligi aĉeton de "Julia". Tion ne faru! Konservu tiun kapitalon! Evitu la plagon de monmanko! Akumulu veran kapitalon, se tio eblas, kaj dume investu ĝin en ŝpardeponojn por tie akiri renton tiel, ke la aĉetpovo de tiu kapitalo estu konservata malgraŭ inflacio, aŭ eĉ pliampleksiĝu.

Tutcerte vi havas jam la demandon: por kio ni bezonas kapitalon? La respondo estas relative facile klarigebla. Ekzistas granda manko en Esperantujo, manko kies plenigo postulata konsiderindan kapitalon kaj kies plenigo estas klare afero de SAT aŭ de unu de la filiaj asocioj de SAT. Tiu manko estas nova eldono de Plena Vortaro de Esperanto, (PV). Tiu libro, verŝajne la plej ofte vendata libro en nia lingvo, estas nun malmoderniĝanta kaj utilecperdanta. Sed la pli nova Plena Ilustrita Vortaro (PIV), ne povas roli kiel anstataŭanto; ĝi estas tro kosta, tro granda kaj tro peza. Neniam elĉerpiĝos la vendebleco por facile portebla sed tamen fidinda vortaro tute en la internacia lingvo.

Mi proponas la elpenson de plano prepari novan eldonon de la Plena Vortaro. La baza celo estu: eldoni libron de la samaj dimensioj de la nuna PV, kaj, se eble, kun la sama fama nomo, sed kun la enhavo ĝisdatigita rilate al ĉiutagaj temoj. La paŝoj de la laborplano estu minimume la sekvaj: kunfandado de la Suplemento en la ĉefan parton, kun samtempa korektado kiel priskribita en la Antaŭparolo al la Suplemento; korektado kie necese pro lastatempa oficialigo de radikoj antaŭe ne-oficialaj, kaj aldonado, post komparoj kun PIV kaj kun la Slipara Vortaro, (de la TC de ISAE), de la bezonataj modernaj radikoj, evitante, tamen, tro liberan allason de pure fakaj terminoj, kaj flankelasante proprajn nomojn.

Tia kolosa laboro tutcerte daŭrus longegan tempon, kaj postulata grandan laborspacon dediĉitan nur al tiu tasko; pagi la kostojn eĉ de la kompostadlaboro forglutus konsiderindan kapitalon longe antaŭ ol envenen la unua enspezo pro vendo; pagi la kostojn de sufiĉe granda unua mendokvanto por ebligi ordinaran unuopan koston konsumus egale grandan kapitalon, kaj superrigardado de la tuto necesus personan dediĉon de tute ne-ordinara homo. SAT-BS disponas pri tia homo; ĉu SAT-BS ne povas akumuligi la necesan monsumon?

Rotterdam,  
1984-09-19

Lorenc' Mi.

**El letero :** "En la lasta L! mi legis, ke L! eble monatiĝos. Laŭ mi, ĉi tio devus esti farita jam de longa tempo. Faru "PLEBISCITO"n kaj decidu laŭ la respondoj.

Ni vivas en epoko, dum kiu la opinio de popolo estas senvalora. Oni esperas la pacon... kaj oni faras la militon. Oni esperas, ke la mono daŭros...en valoro, kaj ĝi elvaporigigas en valoro, fakto, kiu ne estis antaŭvidebla, kiam oni inventis la monbileton. Estu "DEMOKRATO" kaj faru "PLEBISCITON"..." -nn-

**Respondo de la red. :** "Ĉar, okaze de pozitiva respondo al la referendumo, kiun amiko -nn- afable sugestis, falus sur miajn ŝultrojn duoble pli da laboro, permesu, ke mi ne estu "demokrato" !

Kiam estos plenumitaj la kondiĉoj, kiujn mi listigis en L! 56, antaŭlasta paĝo, t.e. : 1) helpo (garantiata por sufiĉe longa daŭro) de surloka amik(in)o por la eldontoj. - 2) regula alveno de pli da kontribuoj (Mi ne povas unue anonci la ĉiumonatigon kaj poste almoze peti la kontribuojn. Mi unue atendu, ke la kvanto da aperigotaj artikoloj necesigu la plidikigon aŭ la ĉiumonatigon).- ... tiam, avertante, ke la abonprezo (ekzemple) duobliĝos, mi povos referendumo peti la opinion de la abonantaro. Ne utilas peti, se ne estas sufiĉe da garantioj, por ke la kaso eltenu - kaj ankaŭ mi! - por ke la legantaro malavare kontribuu...

"Laŭte!" kuŝas sur individuaj iniciatoj, individuaj kunlaboroj, sen ajna garantio. Se mi malsaniĝus dum pluraj monatoj, ne plu estus L!, do ni estu singardemaj kaj ne impetu senbremse al abismo!" **Kribo**

## ANALIZA GRAMATIKO (2)

\*\*\*\*\*

### La verbaj tempoj en la subpropozicioj

La sesa Fundamenta regulo eĉ ne mencias la demandon pri la tempo de la verboj en la subpropozicioj, kaj la intuicia uzado de Zamenhof, kontraŭdira, povis nur ekorienti. Li lasis ĉi tiun gravan parton sen normo, kaj tia ĝi restis, kaj la esperantistoj senĝene metis ĉiuokaze iun tempon aŭ alian, ne ja laŭ sia kriterio, sed laŭ sia sento, kiu ĝenerale naskiĝas de la nacilingvaj kutimoj. Kaj Esperanto estas tiom simpla, tiom klara, ke eĉ misuzata ĉiam estas komprenebla... proksimume. Multfoje oni simple konjektas, supozas aŭ divenas la signifon, kaj tio sufiĉas en nia familia rondo de ĉiamaj lernantoj, sed la praktika uzado de tia lingvaĵo en diplomatio aŭ ĉe la notarioj povus originigi gravajn konfliktojn. Cetere, la Internacia Lingvo povas kaj devas esti preciza, supera lingvo.

Ĉi-kaze, la solvo estas simpla kaj universale komprenebla. Kiam la ago de la subpropozicia verbo estas **konceptata efektiva**, reale okazanta, okazinta aŭ okazonta, konvenas uzi **tempon absolutan** kiel en la sendependaj propozicioj. Tio okazas post precipaj verboj similaj al vidi, konstati, k.s.

#### Ekzemploj:

Li ĉiam venis akurate. - Mi sciis, konstatis, kontrolis, ke li ĉiam venis akurate.

Li estis edziĝinta la antaŭan tagon. - Oni informis min, ke li estis edziĝinta la antaŭan tagon.

Li kuŝas sur la lito. - Mi vidas, ke li kuŝas sur la lito.

Ŝi estis forironta tuj. - Mi divenis, komprenis, sciis, ke ŝi estis forironta tuj.

Kiam la ago de la subpropozicia verbo **ne estas konsiderata efektiva**, sed nur imagata, ĝia tempo devas esti ĉiuokaze **relativa al la tempo de la precipa verbo**. Tio okazas post precipaj verboj similaj al diri aŭ pensi, aŭ iuj aliaj, kiuj ne esprimas agon efektivan.

#### Ekzemploj:

Li diris : mi vidas densajn nubojn. - Li diris, ke li vidas densajn nubojn.

Vi imagos, revos, pensos : mi jam estas riĉa!. - Vi imagos, ke vi jam estas riĉa, sed reale vi ne estos tia.

Oni pensis, imagis : ĉio estas perdita!. - Oni imagis, suspektis, kredis, ke ĉio estas perdita.

Ŝi ĵuris : Mi ne estis lasinta lin. - Ŝi ĵuris, ke ŝi ne estis lasinta lin.

Ili asertis : ni venos akurate. - Ili asertis, ke ili venos akurate, sed ili ĉiam venis malfrue.

Ŝajnis, ke ŝi povas nek vivi, nek morti.(Z)

Kvankam sen fido pri ĝi, ĉar li ne kredis pri ĝia valoro absoluta, kiu formulis plej simple la regulon necesan, kaj ne nur rilate al la tempoj, estis Prof. G. Waringhien en "Lingvo kaj Vivo", paĝoj 124--129 :

"Ĉiu verbo en subpropozicio havas la saman tempon aŭ modon, kiun ĝi havas, se ĝia propozicio fariĝus memstara."

Ĉio ĉi estas atentinda!

**L. Mimó**

*Nasrudin decidis lerni liut-ludi. Li demandis liutiston, kiom kostas. "Tridek stelojn la unuan monaton; poste dek stelojn monate."*

*"Bone: mi komencos la duan monaton."*

## LA "3X + 1" - PROBLEMO

En (1) de ĉi tiu serio mi prezentis problemon jam solvitan, kiun tamen kelkaj provis/as (ho vane!) "renversi". Ĉi-foja problemo estas ankoraŭ ne solvita (en matematika dialekto: malfermata).

Ekde iu pozitiva entjero  $n$  ni konstruu jenan vicon :

$$a_0 = n, \\ a_k/2 \quad \text{se } a_k \text{ estas para,}$$

$$a_{k+1} = \begin{cases} 3a_k + 1 & \text{se } a_k \text{ estas nepara.} \end{cases}$$

Tiun vicon ni nomu Collatz-vico de  $n$ . Ekzemple, Collatz-vico de 5 kaj 7 estas respektive :

5,16,8,4,2,1,4,2,1,...

7,22,11,34,17,52,26,13,40,20,10,5,16,8,4,2,1,4,...

Vi vidas, ke se la vico pasas unufoje "1", tiam la vico ciklas senfine : ...,1,4,2,1,4,2,1,4,2,...

Nun ni povas priskribi "3X + 1"-problemon (iufoje konata lige al diversaj nomoj : Collatz, Syracuse, Hasse, Kakutani):

Ĉu ĉiu Collatz-vico pasas "1" ?

Oni scias helpe de komputilo, ke por ĉiu  $n$  inter 1 kaj konsiderinde granda  $m$  (nunmomente mi ne scias, kiom estas tiu  $m$ ) Collatz-vico de  $n$  pasas "1".

La problemo ŝajnas relative nova; ĝia historio ankoraŭ ne ampleksus eĉ 40 jarojn. Unuavide al mi ŝajnas, ke la problemo ne povas esti serioza stud-objekto de fakuloj, ĉar ĝi estas de "loka" karaktero, eĉ se kiel ajn ĝi estus malfacila. Sed ne estas tiel. Aperas disertaĵoj ĉi-rilataj sur seriozaj fakgazetoj. Iu eĉ "pruvis" la problemon jese; necesas rapide aldoni, ke tuj poste alia atentigis, ke la "pruvo" entenas erarojn. Ĝis la fino de 1982 la problemo restis ne solvita, kaj supozeble ankoraŭ nun. Do, ĉiu (ankaŭ vi!) havas ŝancon esti la unua solvinto, kvankam mi malkonsilas al vi okupiĝi pri ĝi.

-- Jamo --

La ĉi-posta tria parto de "Alvokoj al la homa konscio" konsistas el : REGULOJ DE DEONTOLOGIO PRI LABORO. En la 84.02.01, 32 personoj kaj 15 asocioj aprobis tiun alvokon, kies ideo estis diskonigita en la 22a de novembro 1982.

Sendinto : koordinatoj  
de la PERSONO,  
aŭ stampo de la ASOCIO

## GRUPO "LABORISTOJ"

Universala grupo de personoj:  
Laboristoj<sup>(1)</sup> kaj nelaboristoj,  
kaj de asocioj<sup>(2)</sup>,  
kiuj aktivas por starigi  
deontologion pri laboro<sup>(3)</sup>

## ALVOKO AL ĈIULANDAJ LABORISTOJ

La aplikoj de iuj sciencoj, interalie de tiuj, kies malkovroj aŭ inventaĵoj servas por pretigi kaj konduki militojn, sciigas nin, laŭ maniero de nun nekontestebla, ke ĉiuj civilizacioj estas fragilaj, kaj riskas esti ekstermitaj, i.a. per armiloj nukleaj, aŭ kemiaj aŭ biologiaj, aŭ per kombino intenca aŭ ne, de du el tiuj armiloj, aŭ de la tri (4).

Se tiu milito, intenca aŭ ne, subite iam okazus, ĉu la postvivuloj, en la landoj kie ili vivtenus, povus serĉi la respondeculojn, persekuti ilin, por ke ili estu punitaj proporcie al la grandegaj suferoj kaj detruoj, kiujn ili kaŭzis persone, aŭ laŭordone, aŭ per sia laboro ? Kaj eĉ, ĉu ne necesus timi, ke la postvivuloj, obstinegaj pro doloro, sin venĝos al senkulpuloj, kun blindeco egala al tiu, kiu ordonis la murdon de la vivuloj ?

Ĉu la homoj, kiuj, en ĉiuj landoj, sentas sin koncernataj pro tiu ebla estonteco de nenombreblaj mortintoj, mortontoj, de doloroj kaj malamoj, ne devus klopodi scii, ĉu la punaj kodoj de ilia lando permesas juĝi alinacianojn ? Ĉu dua "Proceso de Nurenbergo", se ĝi povus okazi, kvietigus la ondon de tiuj malamoj ? Ĉu ne necesas, konsekvence, krei UNIVERSALAN KORTUMON DE JUSTICO, disponeblan por individuoj samkiel por nacioj, antaŭe agnoskitan de la homoj - se ne de regantoj - por juĝi militkrimojn, genocidon, homaricidon, kaj ilian preparadon ?

Ĉu la postvivuloj permesus, ke la responduloj, en ĉiuj niveloj, pretendu pro la obeo al donitaj ordonoj, pro la ne-retroaktiveco de la leĝoj aŭ pro ties neaplikeblo kaŭzita de manko - intenca aŭ ne - de aplikdekretoj aŭ cirkuleroj, pro laborrajto aŭ -neceso ?

La perspektivo de tiu milito, agnoskita de la registaroj en multnombraj landoj, instigas la subskribintojn de la nuna alvoko deziri, ke reguloj de deontologio estu fonditaj por la labormondo, en ĉiuj ĝiaj niveloj. Ja ekzistas, interalie en Francio, kodo pri medicina deontologio, kaj personoj kaj asocioj ĵus fondis grupon por peti starigon de kodo pri scienca deontologio (5). La akcepto de tiuj reguloj, fare de la laboristoj kaj ties sindikatoj donus al laboro novan dimension, ĉar moralan kaj universalan pro tio, ke la laboristoj fariĝus responduloj pri la vivo kaj postvivo de ĉiuj vivaĵoj, laboristoj kaj ne-laboristoj. Tiuj reguloj de deontologio pri laboro, el-laborigotaj, kondukus al starigo de UNIVERSALA KODO DE DEONTOLOGIO PRI LABORO.

Potencaj nacioj, iliaj satelitoj kaj aliancancoj, partoprenas jam de jaroj en armil-konkuro tiel danĝera, obstinega, ĝeneraligita, ke ni ĉiuj devas nin demandi, ĉu ĉiu el ni ne havas jam sian parton, eĉ malgravan, senperan aŭ plej ofte peran, en tiu prirespondeco, kaj ĉu ni ne devas postuli, ke oni respektu nian individuan ekkonscion kaj komprenu nian rifuzon dividi tiun prirespondecon pri proksimiĝo de genocido.

Tiuj reguloj de deontologio do konfirmus, por ĉiuj laboristoj ilian ekkonscion nepran kaj nediskuteblan ĉar moralan, pri rifuzo fabriki armilojn nukleajn, kemiajn, biologiajn, pecojn, brulaĵojn, produktojn aŭ venenojn, kiuj eniras en la konsiston de tiuj armiloj, iliajn sendilojn, ilian tutan logistikan ekipaĵon. La starigo de tiuj reguloj permesus konstati, ĉu la deklarita pacismo de sindikatestroj aŭ politikestroj estas reala aŭ parola. Reala, ĝi devus esprimiĝi per sindikataj decidoj, kiuj agnoskus la unuaecon de la vivrespekto, per leĝproponoj kaj leĝoj celantaj malarmadon. Konstatante la vanecon de realigo de ĝenerala malarmado, homoj pli kaj pli konsciaj, ke solaj, aranĝoj unuflankaj, progresivaj kaj kontrolataj pri malarmado, kreos la necesegan dinamikon pri la paco, kiu tiel pravigos la DEONTOLOGION PRI LABORO (6).

Se aperas evidente, ke la laboristoj ne aŭ ne plu devus labori por elpensi kaj produkti armilojn por amasa detruo, kiuj ekstermus gravajn kvantojn da laboristoj (kaj da ne-laboristoj), necesus akcepti ankaŭ, ke la laboristoj povu, konsciencie, en iu aŭ alia momento de sia kariero voli ne plu plenumi sian laboron, kiun ili juĝus neakordigebla kun la nova opinio, kiun ili ekhavus pri la respekto al la vivo, ĝenerale, senprokraste aŭ ne, aŭ speciale al tiu de iliaj laborkamaradoj, aŭ al

tiu de ilia familio, aŭ eĉ sole al sia propra vivo, sen tio, ke la manifestado de tiu volo neprigu por ili profesian sankcion neakceptindan (maldungon, ekzemple)(7). La reguloj de DEONTOLOGIO PRI LABORO do devus inkluzivi "konsciencklaŭzon", kies eblaj motivoj estus fiksitaj laŭ la profesioj, ties malutilo kaj ties danĝeroj por la laboristoj kaj/aŭ por ĉiuj, kiuj suferus iliajn efikojn, senprokraste aŭ ne.

Atendante, ke tiuj reguloj de DEONTOLOGIO PRI LABORO estu establita, la subskribintoj de tiu ĉi alvoko deziras, ke la laboristoj debatu pri tio inter si kaj per ĉiuj komunikebloj, kiujn ili povas disponi : kunvenoj, sindikataj bultenoj, klopodoj, manifestacioj, sindikatoj, politikaj partioj, amas-komunikiloj, ke ili akiru la prikonsideron de tiu problemo fare de sia sindikato, kaj ke ili mem kaj ilia sindikato aliĝu al nia "Grupo LABORISTOJ", kiu establos projekton pri tiuj reguloj de DEONTOLOGIO PRI LABORO.

-----  
 (1) Ni donas al vorto "Laboristoj" ĝian difinon la plej larĝan : tio estas viroj aŭ virinoj, kiuj kontribuas por salajro aŭ bonvole, direkti, enkadrigi aŭ efektivigi fizikan aŭ intelektan laboron, praktiki kian ajn aktivecon moralan, kultan, klerigan, ktp.

(2) Pri asocioj, ni komprenas ĉi tie ĉiuspeciajn grupojn de personoj : asocioj, kooperativoj, sindikatoj, ktp, deklaritajn aŭ ne, strukturitajn aŭ senformajn, kiuj zorgas nur, aŭ precipe, aŭ akcesore pri moralaj problemoj de la laboro.

(3) Deontologio pri laboro : regularo, kiu fiksas la moralajn devojn de la laboristoj inter ili, vid-al-vide al iliaj dungitoj aŭ dungintoj, kaj de tiuj, konataj aŭ ne, kiuj suferas aŭ suferos la efikojn de ilia laboro, tuje aŭ ne.

(4) Legi la verkon : "La armiloj por masiva detruo kaj la franca politiko de defendo", bulteno P.J.R. n° 79/80, 4a trimestro de 1979 (franclingve), de Y. Le Hénaff.

(5) Universala grupiĝo de personoj kaj asocioj aktivantaj por starigi universalan kodon pri scienca deontologio, supernaciajn servojn de sciencaj rekomendoj kaj decidoj, kaj universalan kortumon (dokumento disponebla ĉe la A.P.J.R.).

(6) La Pacista Unio de Francio (4 rue Hoche, F 92100 BOULOGNE) animas en Francio la kampanjon por unuflanka malarmado.

(7) Vidi la "Proponon celantan respektigi liberon kaj konsciencon de ĉiuj, kiuj volas ne plu labori depende de jonigantaj radiadoj", prezentitan de APJR en '78, franclingve disponeblan ĉe APJR, k ĉi-poste aldonitan.

Alvoko diskonigita en la 82.08.30

Ĝisdatigo n° 4 : 83.06.28

La.....

Subskribo de la sendinto :

# PROJEKTO PRI REGULOJ DE DEONTOLOGIO PRI LABORO

## 1. DIFINOJ

- 1\* **Laboro** : ĉiu homa agado, salajrata aŭ ne, memvola aŭ trudita.
- 2 **Laboristoj** : ĉiuj personoj, kiuj kontribuas, kontraŭ salajro aŭ memvole, direkti, enkadrigi aŭ efektivigi laboron fizikan aŭ intelektan, praktiki ian ajn agadon moralan, klerigan, kultan, ludan, ktp.
- 3 **Organizo de laboristoj** : ĝenerale, la laboristaj organizoj celas esence ĝis nun defendon de la materiaj interesoj de siaj komisiintoj, la moralaj konsideroj - eĉ se atentataj - intervenas nur akcesore por tiu defendo. La nuna projekto volas, ke tiuj moralaj konsideroj unuarange intervenu en la organizadon de la laboristoj. Respektante tiujn, kiuj sin tenas je la materialista difino de tiu organizo, tiu, kiun ni sugestas estas jena : ĉiu kolektivo de personoj, kiu defendas la moralajn aŭ moralajn kaj materiajn interesojn de laboristoj, submetante tiujn interesojn al la observado de reguloj de deontologio pri laboro; entreprenestroj kaj kadroj sin konsideras ĉi tie kiel laboristojn, kiuj akceptas apliki tiujn regulojn de deontologio pri laboro. Eventuale, tia organizo de laboristoj povas direkti aŭ administri la entreprenon, en kiu ili laboras.
- 4 **Deontologio pri laboro** : Tuto de la reguloj, kiuj fiksas la moralajn devojn de laboristoj inter ili kaj de ĉiuj, konataj aŭ ne, kiuj suferas aŭ suferos la efikojn nocajn aŭ/ kaj danĝerajn - aŭ kiuj sin malkovros tiaj - de sia laboro, tuj aŭ poste.

## 2. ESENCAJ PRINCIPOJ

- 5 Ĉiu laboristo respektas ĉiujn homojn. Li akceptas, ke la homoj havas aliajn kredojn, kutimojn, lingvojn aŭ dialektojn, agmanierojn ol la liajn. Se li klopodas konvinki ilin pri la praveco de siaj propraj kredoj, ideoj, ktp, li rifuzas trudi ilin al ili per forto aŭ hipokriteco.
- 6 Ĉiu laboristo respektas ĉiujn homojn en ilia estonteco. Do li malpermesas al si ĉiun agadon, kiu povus malutili la estontajn generaciojn.
- 7 Ĉiu laboristo, solidara de ĉiuj homoj, devas apliki en
- 30 \* La alineoj estas numeritaj por faciligi la transporton de viaj rimarkoj.

sia laboro la principojn de vero, verdiremo, justeco, interhelpo kaj bonvolemo.

## 3. REGULOJ DE DEONTOLOGIO PRI LABORO

- 8 Neniu laboristo povas esti devigata fare de lerneja orientigo, universitata aŭ teknologia specialigado, aliĝo al profesia kategorio, plenumi laboron neakordigeblan kun siaj moralaj konvinkoj.
- 9 Ĉiu laboristo estas libera aliĝi al libere elektita organizo de laboristoj.
- 10 Ĉiu organizo de laboristoj servas siajn komisiintojn, kiuj ne servas ĝin. Ĝi disponas nenian privilegion, kiu ebligus limigi ilian opiniliberon, la sendependon de ilia ago kaj la striktan memstarecon de ilia profesia aŭ privata vivo.
- 11 Organizo de laboristoj estas libera havi nur materialistajn celojn en rekta rilato kun iu profesio aŭ iu grupo de precizaj profesioj. Ĝiaj statutoj devas tiam indiki tiun memvolan limigon de siaj celoj. Ĝi devas informi pri tio la kandidatojn al aliĝo. Siaflanke, la laboristoj, en sia aliĝpeto, devas agnoski, ke la organizo, al kiu ili deziras aliĝi, persiste havas nur strikte materiajn celojn.
- 12 Ili devos krome subskribi deklarojn de moraleco apartajn laŭ sia profesio : ekzemple, laboristo (entreprenestro, kadro, laboristo) de armiluzino devos agnoski :
- a) ke li opinias, ke la armiloj povas esti uzataj por la defendo de homa grupo;
  - b) ke armiloj uzataj de homa grupo povas havi detruan rezultaton, kiu superas la defendbezonojn kaj ĉiujn homajn konjektojn;
  - c) ke tiaj armiloj povas esti uzataj preventive kaj kontraŭ civilaj loĝantaroj.
- 13 Organizo de laboristoj povas havi, krom siaj strikte materiaj celoj kaj super ili, celojn de homama protekto, pravigitajn pro la minacoj de genocido, kiuj pezas sur la homoj. Ĝiaj statutoj devas tiam indiki tiun vastigon de tiuj celoj al ĉiuj kandidatoj al aliĝo. La aparteno al organizo de laboristoj donas rajtojn kaj trudas devojn : se ĝiaj celoj plivastiĝas trans la kadron strikte materialan, rajtoj kaj devoj sin trovos pliigitaj, kaj por la organizo, kaj por ĝiaj anoj.
- 14 La laboristoj, en sia deklaro de aliĝo al tia organizo



de laboristoj, devas do agnoski, ke ĉi-lasta havas homamajn kaj defendajn celojn rilate iliajn materiajn interesojn. Ili devos eventuale subskribi aldonan deklaron pri moraleco. Ekzemple, inĝeniero devos skribi agnoski, ke li malpermesas al si ĉiun esploron pri la bombo kun neŭtronoj.

- 15 Ĉiu laboristo povas en ĉiu momento de sia kariero sin apogi sur "KONSCIENCA KLAŬZO" permesanta rifuzi laboron, kiun li plenumis ĝis nun, sed pri kiu li nun komprenas la malutilojn kaj/aŭ la riskojn por la homoj, ĝenerale, nun aŭ estonte, aŭ por sia familio, aŭ por siaj laborkamaradoj, aŭ por si sola. La motivoj pri akcepto de la "konsciencia klaŭzo" estos fiksitaj laŭ regule de egaleca komisiono laŭ la profesioj, la malutiloj kaj la riskoj eventuale propraj al tia sektoro de la konsiderata profesio. La apliko de tiu klaŭzo ne devas nepriigi por la plendanto gravan profesion sankcion, kiel la fordungon, sed tujan reklasigon laŭ la plej bonaj ebloj.
- 16 La organizo de laboristoj, kiun ni deziras, praktikos en ĉiuj okazoj la demokratian regulon de la sekreta voĉdono. Kiam tiu organizo kunekzistos en entrepreno kun unu aŭ pluraj aliaj organizoj de laboristoj, reprezentantoj de ĉiuj tiuj organizoj kontrolos la komunajn sekretajn voĉdonojn.
- 17 Deontologio pri laboro trudas koni la veron rilate la plenumatajn laborojn kaj ties proksimajn aŭ malproksimajn rezultatojn. Tiu neceso trudas la nuligon de ĉiuspecaj sekretoj. La laboristoj rajtas postuli tiun veron kaj ĝin ricevi.
- 18 Ĉiu atenco al la deontologio pri laboro fare de laboristo aŭ organizo de laboristoj povas okazigi apelacion.
- 19 Konfederacio, kiu havas nur celojn pri defendo de materiaj intereso, ne povus enlasi nacian sindikaton, kiu havas celojn homamajn kaj materiajn. Same, nacia sindikato, kiu havas nur celojn pri defendo de materiaj intereso, ne povus enlasi lokan sindikaton, kiu havas celojn homamajn kaj materiajn.
- 20 Inverse, lokaj sindikatoj, kiuj havas celojn homamajn kaj materiajn, ne povus krei lokan unuiĝon kun aliaj lokaj sindikatoj, kiuj havas nur materiajn celojn kaj naciaj sindikatoj, kiuj havas celojn homamajn kaj materiajn, ne povus krei konfederacion kun naciaj sindikatoj, kiuj celus nuran defendon de materiaj intereso de

la sindikatanoj.

- 21 Tiu disigo inter laboristaj organizoj homamaj-profesiaj, kaj nur profesiaj, pravigita pro la graveco de la nuklea minaco, evidente ne malpermesas interrilatojn de bonkora najbareco.

Alvoko diskonigita en la 82. 08.30

Ĝisdatigo n° 3 : 83.09.19

## ALDONO

### Propono celanta respektigi liberon kaj konsciencan de ĉiuj, kiuj volas ne plu labori depende de jonigantaj radiadoj

De post la kreo de nia asocio en 1962, ĝiaj aliĝintoj, en niaj tiamaj ĝeneralaj asembleoj, adoptis proponojn cele al protekto kontraŭ nocivo kaj danĝeroj de jonigantaj radiadoj, kaj ili plibonigis ties redaktaĵon.

Anoj de A.P.J.R. kontraŭas la nuklean industrion kaj ili klopodas informi kaj konvinki aliulojn pri la realeco kaj graveco de tiuj nocivo kaj danĝeroj.

Ĝuse, la kazoj de du aliĝantoj komprenigas al ni la situacion de ĉiuj al kiuj oni trudas kontraŭ ilia volo laboron en medio poluciata aŭ poluciebila fare de radioaktivaj izotopoj. Unu estis surradiita kiel daŭra laboristo en nuklea entrepreno, alia eble estis surradiita kaj riskis esti tia kiel laboristo en neruklea entrepreno, kaj ambaŭ ekkonsciis pri la nocivo kaj danĝeroj de jonigantaj radiadoj nur laborinte en medio radioaktive poluciata.

Tiu ekkonscio kondukis ilin elpaŝi por provi respektigi sian laborliberon, la protekton de sia sano, la subtenon, kiun ilia laboro portas al ilia familio, kaj sian konsciencan pri la nocivo kaj danĝeroj de la jonigantaj radiadoj.

Tia mi prezentis novan proponon al ekzameno kaj voĉdono de la APJR-anoj. Kalkulinte kun iliaj rimarkoj, la sekvanta propono estis adoptita dum la Ĝenerala Asembleo, en Rubezo la 8an de oktobro 1978. Tiu adopto ne entenas nian rekonon pri la utileco de la nuklea industrio, sed la necescon protekti ĉiujn, kiuj kontraŭvole suferas ĝiajn nocajn efikojn, kaj la amikecon, kiun ni sentas por ĉiuj homoj.

**Nova Propono 21a.** La APJR PROPONAS, ke la leĝaro kaj la labororganizado en ĉiuj instaloj kaj industrio, nukleaj aŭ uzantaj radiadojn elektromagnetajn (IKS kaj gama) aŭ partiklajn (alfa, beta, neŭtronika, ktp) estu plibonigitaj por ke estu respektataj la **libero** kaj la **konscio** de laboristoj :

1. ke ĉiuj laboristoj, kiuj kutime aŭ okaze laboras sub jonigantaj radiadoj, ricevu antaŭ ĉiu laboro, kaj en sia gepatra lingvo, klaran kaj kompletan instrukcion pri la nocivo kaj la danĝeroj de la jonigantaj radiadoj, ĝenerale kaj en la kadro de sia persona laboro, koncerne la teknikojn de radiologia protekto nepre aplikendaj, koncerne la legadon de la krajono-doza metro, kiun ĉiu devas porti, kaj koncerne la

komprenon pri la rezultoj de sia dozometrio, komparotaj kun la leĝaj maksimumaj akcepteblaj dozoj;

2. ke la laboristoj sub jonigantaj radiadoj de industrioj, esplorcentroj, laboratorioj, medicinaj establoj, specife nukleaj aŭ uzantaj radiadojn elektromagnetajn aŭ partiklajn, povu pretendi pro "**konscienc-klaŭzo**" pravigita de unu aŭ pluraj el la sekvantaj motivoj : protekto de sia persona sano, protekto kontraŭ la genetika risko, malkonsento partopreni per sia laboro en la pligrandigo de la nocivo kaj riskoj imputeblaj al jonigantaj radiadoj. Uzo de tiu "**konscienc-klaŭzo**" permesus al ili ĉesigi provizore aŭ definitive sian laboron sub jonigantaj radiadoj, sen ke tiu malkonsento povu esti konsiderata de iliaj oficestroj kiel unuflanka rompo de sia laborkontrakto (skriba aŭ ne), kaj tiam esti vokitaj labori en okupoj ne radiriskaj de sia entrepreno aŭ establo ;

3. ke la okupoj sen skriba kontrakto, ke la skribaj laborkontraktoj, ke la aliro al profesia sekreto koncerne tiun laboron, estu proponitaj al ĉiuj laboristoj nur post klarigo pri iliaj biologiaj efikoj, por unujara daŭro, renovigeblaj skribe ĉiujare, sub la limiga kondiĉo, ke la plej freŝdata regularo koncerne la sekurecon de la laboro sub jonigantaj radiadoj estu rememorigita ĉiujare sur tiu skribo komplete kaj kompreneble por ĉiuj laboristoj (en ilia nacilingvo por la fremdaj laboristoj);

4. ke la laboristoj en entreprenoj specialigitaj aŭ de nedaŭra laboro, eksteraj al instaloj kaj industrioj kiujn celas tiu ĉi propono, kaj kiuj laboras tie okaze, povu ĉiumomente rifuzi labori sub jonigantaj radiadoj, sen esti iel punitaj de siaj precipaj oficestroj;

5. ke la dosieroj pri surradiado de ĉiuj koncernaj laboristoj estu rekonitaj kiel ilia persona proprietaĵo, la laboristoj nepre prezentu ilin al medicinaj oficoj por la ĝisdatigoj, kaj la medicinaj oficoj povu evidente kopii ilin ;

ke troviĝu en tiu dosiero laŭ maniero klare formulita kaj detala

- la gama-doza metro kalkulita per la filmoj-doza metroj,

- la dozometrio taksita kaj kalkulita laŭ la neŭtronaj radiadoj koncerne ĉiun intervenon sub tiuj radiadoj,
- la antropogamametraj kontroloj en la kazoj de akcidento pro infekto per enspiro aŭ enstomakigo,
- ĉiuj analizoj kaj kontroloj de la sekrecioj, kiuj povas utile informi la dosieron (sanga formulo, beta-kontrolo de la urinoj, ktp),
- ke la M.A.D. (Maksimuma Akceptebla Dozo) leĝa estu konsiderata de la labordonanto kiel limo nur escepte alproksimigota (transe, li devas fari deklaron ĉe la laborinspekto), kaj ĉiukaze ke la laboristoj estu neniam sisteme utiligataj ĝis sorbado de tiu M.A.D.,
- ke la leĝaro pri M.A.D. estu reviziita, kaj ke estu rezignita la ideo de sojlo sub kiu nenia noco ekzistus;

6. ke la laborkuracistoj estu senpere komisiitaj kaj pri kontrolo de la krajono-dozometroj, kaj pri legado de la rezultoj pri iliaj dozometrioj, kies donitaĵojn ili komunikos kaj komentos al koncernaj laboristoj, samtempe kiam ili transskribos ilin sur iliaj dosieroj pri surradiado.

Ĝisdatigo n° 4 : 78.12.23

La APJR-anoj, deziras, ke la koncernaj laboristoj petu de siaj respektivaj sindikatoj ilian pozicion kaj iliajn postulojn pri tiu objekto, kaj ke la legantoj nerekte koncernataj pri tiu problemo bonvolu transsendi tiun proponon al siaj intereseblaj amikoj.

Kore,

La Prezidanto-fondinto de APJR (en 62),  
Direktoro (de 62) de la bulteno P.J.R.  
Johano PINJERO

# laŭtaj informoj kaj petoj



**Akvitanio : la regiona Zamenhof-festo okazos en Montauban (Tarn-Garonio), la 2an de decembro 1984** en "Foyer de Villebourbon"

(kvartalo de la stacidomo), 23 rue des Augustins.

Eblos alveni ekde Sabaton la 1an de decembro je la 18a kaj tranokti surloke en dormejo (aŭ en hotelo).

\* Antaŭvidita pago (manĝo + luprezo de la salonoj) : 40 FF.

\* Programo (ne definitive aranĝita) : SABATE : Amikaj interŝanĝoj. Koope-rativa vespermanĝo (estos proponataj supo kaj fruktoj). Projekciado pri paca aŭ socia temo kaj diskuto. DIMANĈE : je la 9a : Akceptado. Promenado en la urbo. Ĝenerala kunveno. 12H30 : tagmanĝo. Posttagmeze : se eblos, teatraĵo.


Kiel eble plej frue sin anonci al : Nicole DEJEAN, 14 rue A.- France, 82000 MONTAUBAN.

NOMO. Antaŭnomo :

1. Alvenos Sabate : jes - ne . Kun .... personoj. Mi(ni) tranoktos en dormejo / hotelo. Per trajno / aŭtobuso / aŭto .... je la .... horo.
2. Alvenos nur dimanĉe kun .... personoj, je la ... horo, per trajno / buso aŭto.

Ĉu vi manĝos vegetarane ?

Proponoj por la programo :



## Ĝirondia vivo

Nia grupo kunvenis, la 6an de Oktobro ĉe Ge-Sevilla, en Gujan-Mestras. 25 personoj ĉeestis.

Ni bilancis pri la pasinta agado la peticioj, la kursoj en lernejo (M. Lavergne), niaj budoj en diversaj festoj kaj kermesoj, niaj dissendoj ĉe lokaj radioj. Poste ni parolis pri niaj venontaj klopodoj por propagandi E-on Afiŝoj (en kolegioj), Esperanto-Amikaro por kunigi la personojn, neesperantistajn, kiuj interncas subteni nian agadon, leteroj al nia ministro pri Edukado. Kaj aliaj ideoj verŝajne ŝprucos en la venontaj grupkunvenoj okazontaj :

## Ĝirondio (daŭrigo)

- en Oktobro : la 30an je la 19a h., en Maison pour Tous, CENON-Palmer. Ceesto de juna germana esperantistino.
- en Novembro : la 20an, je la 19a h., en Foyer Culturel de EYSINES.

## Ekspozici-materialo estas disponebla

La Girondia Grupo de E-istaj Laboristoj metas sub vian disponon ĉ. 400 infanajn desegnaĵojn kaj pentraĵojn, kunigitajn el tridek landoj dank'al la lingvo Esperanto, kaj mapojn, etiketojn, ktp. La interesatoj bonvolu sin turni al Simonne BERNARD, 171 rue Raymond Poincaré, 33110 LE BOUSCAT, kiu pri-zorgas starigon de migradplano, ankaŭ plian informadon laŭdezire.

La financaj kondiĉoj estas maldrastaj : transportkosto memkompreneble estos je ŝarĝo de la uzonto, krom tio ni petos la mendintojn bonvole enverŝi mendokotizon je 100 FF en la kason de la Girondia Grupo de E-istaj Laboristoj por nutri fonduson celantan helpi al juna grupan(in)o partopreni en tutmonda kongreso.

La interesatoj ne tro longe atendu por enlistiĝi; la unuaj mendantoj havos plen bonan ŝancon plenumi siajn dezirojn.

**La semajnfierio en Sète okazis de la 9a ĝis la 16a de septembro.** Partoprenis kvardek gekamaradoj : ĉefe geemeritoj, kompreneble, sed ankaŭ junaj poŝtovicistoj, germana fervojisto, ĉeĥo-slovakiano, kaj eĉ paro el Alasko. Krome, jugoslava junulino kompetente instruis la duan el la kvar lernniveloj de Esperanto. Du lernantoj trapasis plensukcese ekzamenojn, fine de la semajno. Mateno kaj parto de la posttagmezo pasis en laboro; restis tempo por bani sin, ekskursi, babilo, kaj...kiel diri pri vesperoj ?... vidi lumbildojn, ludi teatraĵetojn, ktp.

Konklude, kvin bordozanoj trovis en tiu semajno agrablan gastejon, amikan etoson, kaj efikan laboron. Gis la venonta septembro!

R. Campagne.

## En Perpinjano...

### Renkontiĝo kun gesamideanoj

Sinjoro Llech-Walter, Prezidanto de la Kultura Esperantista Centro en Perpignan, ricevis leteron el Opole pri speciala vagono kun tridek poloj, kiuj intencis viziti kelkajn landojn : Italion, Francion, Hispanion, Belgion, Okcidentan Germanion. Ciuj ekskursanoj estas fervojistoj kaj la tuton organizis la Pola Fervojo. Inter tiuj 30 Poloj estis dek Esperantistoj.

Trapasante Francion en la urbeto Cerbère, ĉe la hispania limo, la grupo bezonis helpi de francaj samideanoj. Do, kelkaj esperantistoj veturis al tiu loko por renkonti la Polan grupon kaj helpi en la traduko el la esperanta lingvo al la franca. La estro de la stacidomo, kiu komprenis nek polan nek internacian lingvon estis tiel ĝoja, ke li promesis al Prezidanto Llech-Walter partopreni Esperanto-kurson. Ni trinkis kune kafon, babiladis gaje, kantis esperantajn kantojn. Ni ankaŭ interŝanĝis donacojn.

Tiu renkontiĝo estis tre agraba kaj ĝoja. Ni povas konstati kiel utile kaj bele povas servi ESPERANTO.

Margareto

**Perpignan.** 18 esperantistoj el Perpignan partoprenis la 20an Kongreson de la Katalunaj esperantistoj en OLOT (Katalunio - Hispanujo).

La unuan de Decembro la Esperantista Kultura Centro akceptos D-ron Istavan GETHER el Hungario, kiu prelegos pri "Hungario, la lando kaj ĝia ekonomio". Informojn donas Esperantista Kultura Centro, 72 av. du général de Gaulle, 66000 PERPIGNAN. Tel. 34.22.18.

**Nekrologo.** Johano LLECH, fondinto de la esperantista federacio "Languedoc-Roussillon" (Langvedoko-Rusiljono) en 1930, mortis en Perpignan la sesan de aŭgusto 1984. J. Llech estis la frato de Renato Llech-Walter, delegito de UEA, kiu aktivis ankoraŭ por nia movado.

**Paŭo :** Dekses-leciona E-kurso serio por komencantoj okazos ekde lundo 5a de novembro '84 je la 19a en "Centre Social de la Pépinière", 6, rue R. Schuman, en Pau (kvartalo de la Fakultatoj). Tel: 02 82 20. Kosto: 120 FF. La lasta kurso okazos la 7an de januaro '85. Por praktike ekuzi la lingvon la kursanoj ekskursos al Zaragozo de la 11a ĝis la 13a de januaro. Proksimuma kosto : 700 FF, inkluzive de manĝoj, hotelo kaj vojaĝkostoj.

## Ĉe la broŝurservo : La nova "Espéranto de poche" disponeblas

La nova eldono de "EF" estas samformata (A6), iom pli dika (82-paĝa).

Ĝi konsistas nun el tri partoj :

- la 24 unuaj paĝoj - nun tajpitaj per Julia - estas enhance similaj al la antaŭa eldono;

- la E/Franca vortaro estas nun la ofeta represaĵo de tiu troviĝanta en "Dictionnaire de poche", do pli belaspekta kaj pli riĉa ol la antaŭa (34 p.);

- fine troviĝas nun la nepre havinda "Les 16 règles de l'Espéranto commentées...", retajpita per Julia en 24 paĝoj.

Projekto : aldoni folion kun adresoj, al kiuj sin turni por sekvi kursojn en la diversaj regionoj de franclingvio.

Prezo de ĉiu ekzemplero : 5 FF. Sed, kompreneble, estas "aŭtomata" 20-procenta rabato al gelaŭtuloj kaj grupaj libroservoj.

Restas disponebla la aparta eldono de "Les 16 règles". Ĉiu: 2 FF.

## Ekologio :

### Kampanjo kontraŭ "Superphénix"

Jen resumo pri la nacia kunordiga kunveno okazinta en Liono la 15an kaj

16an de septembro. Partoprenis 28 asocioj. Somere venis al Creys-Malville proksimume 4000 manifestaciintoj. Bona loka mobiliziĝo kaj bona sinteno de la amaskunveno bone impresis la regionan loĝantaron.

Amaskomunikiloj : Ili komparis kun la manifestacio de 1977 : negativa flanko. Sed oni raportis pri tio en regionaj kaj naciaj gazetoj, en radio kaj televido. Por pli da informoj estas disponebla gazetdosiero kontraŭ 15 FF.

Paca Kampo : La kunveno decidis starigadon de paca kampo.

Italoj prezentis historion pri la leĝa sicilia tendaro en Comiso, kaj anglo pri la kontraŭleĝa virina tendaro en Greenham Common.

Tiu paca kampo estos malfermita al ĉiuj, kiuj deziras partopreni unu tagon, unu semajnon aŭ restadi plue. Oni uzos neperfortan strategion, eĉ se ĝi ne estos laŭleĝa.

**Proponoj :**

- marŝado La Hague - Malville
- blokado de transporto de nukleaj materialoj. Interesa laboro, sed oni bezonus firman reton kaj bonajn informojn. Nun reto estas starigita kun WISE kaj Green Peace.
- somera universitato, somera renkontiĝo.
- Eŭropa prelego : anoj de "ĉielarka"-frakcio proponis materian subtenon. Tio ebligos facile obteni kunvenajn salonojn en Strasburgo kaj Bruselo. Por pli da informoj, sin turni al :

Coordination nationale pour l'arrêt de Malville  
c/o C E P , B.P. 5006 St Jean, 69245 LYON CEDEX 5  
Financa subteno : Michel BERNARD, ccp 626 63 K Lyon.

Komunikis : GINETTE

**Libro-servo de AERA** Cercle amical esp. agenais  
47340 Laroque Timbaut. Poŝtkonto: 3371 74 M Bordeaux  
(La prezoj, en FF, ne entenas la afrankon.)

Nouveau cours rationnel (bind)	50	• Plena analiza gramatiko	130
Kasedo por Cours Rationnel	35	Plena vortaro de esperanto	65
Dictionnaire pratique	65	Plena ilustrita vortaro	290
Dictionnaire de poche	15	Skizo pri filozofio de la homa digno	
Esperanta Mozaiko (Faulhaber)	17	(Gille, trad. Lanti)	10
Falsaj amikoj (Ribot)	6,50	Tri verkoj de Volter (tr. Lanti)	50
Forto de l' Vero (Adi)	18	Vivo de Lanti (Borsboom)	60
Grand Dictionnaire E/F	75	Vers une communication	
Hamburgo en retrospektivo	60	internationale	1
Junulejo (Cané) + La buĉejo	10	<b>Nur malmultaj ekzempleroj:</b>	
Junulkurso (komentoj franc.)	30	Baza literatura krestomatia	32
Suplemento al Junulkurso (fr)	6	Dictionnaire F/E (Léger/Albault)	30
Diskoserio de Junulkurso	35	Interesa arkeologio	20
Kalejdoskopaj varioj	10	Junulkurso por portugaloj	30
La varmega suno	6	Libro de romanoj	35
Ne tiel sed tiel-ĉi (Faulhaber)	28	Ni devas vivi	15

\*\*\*\*\* En la franca, la libro de franca kuracisto "Docteur Jacques":  
"Vos chaînes". Prezo kun afranko : 70 FF \*\*\*\*\*  
\*\*\*\*\*

**Plu disponebla** ĉe SAT-Broŝurservo : serio el 8 diversaj poŝtkartoj eldonitaj de SAT-Junulfako. Ĉiu poŝtkarto : 1,50 FF. Por pli ol 10, ĉiu : 1,20. Por pli ol 50, ĉiu : 1 FF. Se vi samtempe mendos broŝurojn, vi ne pagos la afrankon.

**Nun elĉerpita** : "Esperanto or English" (Henri Masson).

**Ĉe la esp-istaj ekologianoj :**

**A. V. E.**

Fine de marto 1984 kelkaj esp-istoj, kiuj ĉu jam aktive agadas en ekologiaj naciaj partioj aŭ movadoj ĉu estas tre favoraj al la ekologiaj principoj, kunvenis en Bruselo ĵus antaŭ la unua kongreso de la Eŭropaj Verduloj en Lieĝo. Tiu kunveno naskis AVE-n (Asocio de Verduloj Esperantistaj), kies ĉefa celo estas disvastigi kaj apliki Esperanton en la Verda Movado (t.e. la politika kaj eksterpolitika movado bazita sur ekologiaj principoj). **Kaj nun ?** Ĉio estas farota ! ... Ni devas nun serioze pripensi kiamaniere ni povas organizi efikan internacian kunlaboron por la verduloj. Ŝajnas, ke la unua tasko de AVE estas krei efikan ligilon inter la verduloj, kiuj en sia lando agadas por konigi kaj akceptigi Esperanton en la ekologiaj naciaj movadoj. Rilate tion, la kolekto kaj publikigo de informoj el diversaj landoj estos sendube utilaj al ĉiuj. Alia tasko de AVE estas helpi la esperantistojn, kiuj laboras en la verdaj movadoj, proponante al ili materialon en diversaj naciaj lingvoj. Aliaparte restas ankoraŭ grava laboro, kiun AVE (kun la helpo de ĉiuj!) povas plenumi. Tio estas la esperantigo de kelkaj interesaj tekstoj de la naciaj ekologiaj movadoj. Tio permesus al ĉiu AVE-ano pli bone koni la tezojn kaj agadojn de la Movado ekster sia propra lando, kaj tiuj tradukoj estus ankaŭ bonaj propagandiloj en la naciaj verdaj medioj. Kompreneble, por efektiviĝi tion ni bezonas vian kunlaboron, viajn proponojn kaj viajn kritikojn...

J-Claude Thumerelle

**AVENO\***

La ĉi-supra artikolo estas ĉerpita el la numero 0 de la ĵus lanĉita bulteno\* de AVE. Tiu numero 0 estas 4-paĝa, sed la n-ro 1, baldaŭ aperonta, estos kompreneble pli ampleksa kun kvar numeroj jare. Por aliĝi al AVE (minimume 10 gld pageblaj al nederlanda poŝtgirkonto 5479470-Krisperanto/Engeland, kun la indiko "por AVE") kaj provizi "AVENON"n per viaj kontribuaĵoj, rekte rilatu kun la sekretario de AVE :  
Jean-Claude THUMERELLE, Place de la Station 16, B 7790 WARNETON.

**Agado komencita de "ECOLO"**

La 23an de majo la belga kaj franca registaroj finfine konsentis pri kunlaboro en la konstruado de nova nuklea centralo (en Chooz). La ekologiaj movadoj longe batalis kontraŭ tiu projekto. Tiu konsento estas sendube malvenko por tiuj movadoj. Sed post la centralo, alia megalomania projekto naskiĝis kaj kontraŭ ĝi la ekologiistoj mobiliziĝis kaj daŭre mobiliziĝos. Ĉiu scias, ke la nukleaj centraloj bezonas multe da akvo. La rivero apud kiu estas la centralo de Chooz havas malregulan elfluokvanton. Sekve la teknokratoj decidis konstrui grandan barajon sur rivero Houille. Tio signifas la detruon de unu el la plej belaj valoj en regiono Ardennes. Pro tio la belgaj ekologiistoj instigis agadon por malhelpi tiun novan projekton. Ili aĉetis terenon apud la rivero. Tio ne estas nur simbola agado, ĉar ili estiĝis leĝe posedanto de minacata tereno. Konkrete oni devas eksproprieti ĝi ilin por komenci la konstruadon. Sed oni devas laŭleĝe obteni la konsen-

ton de la posedanto antaŭ la eksproprieto. Oni facile komprenas, ke se estas multaj posedantoj por tiu aĉetita tereno la jura proceduro povas longe daŭri kaj multe malfruigi la konstruadon de la baraĵo. "Ecolo" proponas sekve al ĉiu, kiu deziras subteni tiun agadon, aĉeti 1 m<sup>2</sup> de la tereno. Tio kostas nur 100 BF (= 15 FF). La partopreno de nebelgoj estas aparte interesa, ĉar tio ankoraŭ pli komplikos la juran situacion.

Oni povas obteni aliĝilon skribante rekte en la franca (kaj nepre menciante, ke oni legis informon pri tio en esperantista revuo) al la sidejo de la Asocio (Ecolo, 26 rue Basse Marcelle, B 5000 Namur) aŭ Esperantlingve al J.C. Thumerelle (adreso menciita antaŭe).

Kun antaŭdanko pro via helpo, **J.C. Thumerelle**

La jara internacia renkontiĝo de esperantistaj geinstruistoj (Freinet-pedagogio) okazos de la 10a ĝis la 20a de julio 1985, en Ŝkofja-Loka, Jugoslavio. Sin turni al Paul POISSON, 239 rue Victor Hugo, F 37450 ST CYR SUR LOIRE.

**Valencio** (Hispanio) : La kultura konsilantaro de la Valencia Urbestro konsentis eldoni esperantlingve tri broŝuretojn pri Valencio : "Historio kaj arto", "Vojaĝplanoj" kaj "Festoj kaj Gastronomio". Kiuj deziras ricevi senpage tiujn belajn broŝuretojn, tiuj povas sin turni al : Grupo Esperanto Valencia, Gran Vía Fernando el Catolico, 45-3º, VALENCIA-8, Hispanio.

La E-fako de la Turista Asocio "La Naturamikoj" (TANEF) jubileas la 100an numeron de sia ligilo "La Migranto" per belega kajero 32-paĝa, ilustrita kaj lukse presita. Por ricevi tiun 100an numeron, sendu 3 internaciajn respondkuponojn al TANEF, Postfach 225, CH-4003 BASEL, Svislando.

**Reĝustigo** : Ne tute ĝustas la rimarko ĉe la fino de la artikolo "Ĉu utopio aŭ ĥaoso?" (Laŭte n-ro 54, p.8,9,10), ke "nun elĉerpita" estas la manifesto de "Monda Socialismo". Efektive, estas elĉerpita nur la teksto eldonita de SAT-Broŝurservo (fontanta el la kanada partio), sed restas disponebla alia teksto, havebla kontraŭ 1 irpk. sendota al : RAPPLEY, Rochussenstraat 133c, NL 3015 EJ ROTTERDAM.

Germana E-Junularo invitas vin partopreni la 41-an Internacian Junularan Kongreson, 22/29.7.1985, en Eringerfeld (Fed. Germanio). Petu aliĝilon al : GEJ, Postfach 101422, D-2000 Hamburg-1, F.R.Germanio.

\*\*\*\*\*  
**VIA SITUACIO**  
\*\*\*\*\*

\* Fino de via abono

En via konto

\* Abono ĝis ~~dec. 1985~~

restas / mankas (-)